


EL *Popola*
ĈINIO

N-ro 4

APRILIO 1967





La revolucia amaso varme kriegas: "Vivu! vivu! longe vivu Prezidanto Maŭ!"

Servu al la Popolo

MAŬ ZEDONG

(La 8-an de septembro, 1944)

NIA Komunista Partio kaj la Okavoja kaj Nova Kvara Armeoj sub ĝia gvidado estas revoluciaj trupoj, kiuj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo. Kamarado Ĝang Side estis unu el la batalantoj de tiuj trupoj.

Ĉiuj homoj mortas, sed ne ĉiu morto havas saman signifon. Antikve en Ĉinio vivis literaturisto nomata Sima Kian, kiu diris: “Ĉiu mortas, sed la morto de iu estas pli peza ol la monto Tajŝan, dum la morto de alia pli malpeza ol lanugero.” La morto por la interesoj de la popolo

La zaijuana milica roto de Jan-an prenas kiel klasĉambrojn por lernado de la “tri malnovaj artikoloj” la kavernon en kiu Prezidanto Maŭ iam loĝis kaj la tribunon kie li faris la paroladon “Servu al la Popolo”. Jen ĝiaj membroj lernas la verkon Servu al la Popolo.



estas pli peza ol la monto Tajŝan; sed la morto de tiu, kiu laboras por faŝismo kaj oferas sian vivon por ekspluatantoj kaj subpremantoj de la popolo estas pli malpeza ol lanugero. Kamarado Ĝang Side mortis por la interesoj de la popolo, kaj lia morto estas pli peza ol Tajŝan.

Ĉar ni servas al la popolo, sekve ni ne timas, ke aliaj kritikis niajn mankojn, se ni tiajn havas. Ĉiu ajn povas montri al ni niajn mankojn, kaj ni estas pretaj korekti ilin, se li nur kritikis prave. Kaj ni tuj akceptas proponon de iu ajn, se nur la propono estas utila al la popolo. La propono pri "bonkvalitigo de la armeo kaj simpligo de la administrado" estis elmetita de sinjoro Li Dingming, kiu ne estas ano de nia partio. Lia propono estas bona, ĝi estas utila al la popolo, do ni akceptis ĝin. Se ni nur persistas en ĉio bona kaj korektas ĉion malbonan por la interesoj de la popolo, niaj trupoj sendube prosperos.

Ni venis el plej diversaj anguloj de nia lando kaj kolektiĝis por komuna revolucia celo. Kaj kune kun la plejparto de la ĉina popolo, ni iros la vojon al tiu revolucia celo. Hodiaŭ, ni jam gvidas bazlokojn kun 91 milionoj da loĝantoj, sed tio ne sufiĉas, ni devas ankoraŭ plivastigi ilin por povi atingi la liberiĝon de la tuta nacio. Alfrontante malfacilojn, niaj

Gelernantoj de Ĉinhuaŝan-komunumo en Ĉangŝa-gubernio, Hunan-provinco kreive lernas kaj kreive aplikas la "tri malnovajn artikolojn". Konstante ili faras bonojn propravole por sia produkta brigado kaj defendas la kolektivajn interesojn. Jen ili kune lernas la "tri malnovajn artikolojn".



Funkciuloj kaj batalantoj el iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kune lernas la verkon Servu al la Popolo.

kamaradoj devas vidi niajn atingiĝojn kaj lumon kaj levi nian kuraĝon. Nun la ĉina popolo troviĝas en suferado, ni havas devon savi ĝin kaj lukti per nia tuta forto. Volante lukti, oni ne povas eviti vivoferojn, kaj mortoj de homoj okazas konstante. Sed, pensante pri la interesoj de la popolo kaj pri la suferoj de la plejparto de la popolo, ni trovas, ke en ĝusta loko ni mortas, se ni mortas pro la popolo. Kompreneble, ni devas kiel eble plej multe redukti nenecesajn vivoferojn. Niaj kardoj devas zorgi pri ĉiu batalanto kaj ĉiuj en la revoluciaj vicoj devas zorgi, ame protekti kaj helpi unu alian.

Estonte kiam iu ajn el niaj vicoj mortos—tute egale ĉu tiu estos kuiristo aŭ batalanto, se nur li faris ian utilan laboron, ni honoros lian enterigon per ĉeesto kaj okazigos funebran kunvenon. Tio fariĝu regulo. Tion ni devas rekomendi ankaŭ al la popolanoj. Se iu en vilaĝo mortos, oni okazigu funebran kunvenon. Per tio ni esprimu nian kondolencon kaj unuigu la tutan popolon.

Ĝang Side—

Granda Komunisma Batalanto

KAMARADO Ĝang Side estis Jilong-ano de Siĉuan-provinco. Lia patrino mortis, kiam li estis sepmonata. Poste vartis lin la malriĉa kamparanino Liu Guangjoŭ ĝis lia maturiĝo. Liu Guangjoŭ estis tiel malriĉa, ke ŝi posedis nek domon nek teron. Estante 12-jara, Ĝang Side jam laboris ĉe terposedanto kun la taskoj paŝti bovon kaj tranĉi herbojn. En 1933, kiam li estis 17-jara, li aliĝis al la Ruĝa Armeo kaj samjare al la Ligo de Komunismaj Junuloj. Poste li fariĝis membro de la Komunista Partio de Ĉinio.

Kamarado Ĝang Side estis tre kuraĝa en bataloj. Foje li sola kaptis el la manoj de la malamiko du malpezajn maŝinpafilojn. Kvankam li mem vundiĝis, tamen li ludis gravan rolon en la batalo por garantii ĝian venkon. Dum la Longa Marŝo, li trifoje trapasis la neĝajn montojn kaj marĉozan stepon pro la bezonoj en la milita manovro. En la servo al la intereso de la popolo, li neniam hezitis antaŭ malfaciloj nek faris ian plendon.

Rilate al revoluciaj laboroj li neniom kalkulis por si kaj neniam elektis inter ili. Pli frue li jam fariĝis estro de subploto. Dum la reorganizado de la armeo en 1942, kiam la Partio transpostenigis lin kiel simplan batalanton pro bezonoj de laboro, sen ajna malbonhumoro, li diris: “La taskoj kaj devoj de subplotonestro kaj batalanto estas malsamaj, sed ambaŭ laboras same por la Partio.” Ĉian laboron li plenumis diligente kaj konsciencie. Vintre, kiam oni konstruis ponton, li la unua vadis en la malvarma akvo por fari necesajn laborojn malgraŭ la frosta vetero. Kiam oni konstruis kaverndomojn, li ĉiam faris pli multe ol aliaj, ĉu en puŝado de terĉaro aŭ en portado de ŝtonoj.

En rilatoj kun la kamaradoj, kamarado Ĝang Side estis ankaŭ elstara en unuiĝo, frateca traktado kaj helpado. Kiel subplotonestro li ĉiam helpis kaj zorgis la batalantojn en politiko, ĉiutaga vivo kaj aliaj flankoj. Dum kampado li meminciate faris diversajn aferojn inkluzive prepari varman akvon por lavi la piedojn de la batalantoj. Kiam la liberigita regiono de Ŝenhi, Gansu kaj Ninghia estis ekonomie blokadita de malamiko, la plejparto de la kamaradoj devis porti pajlajn sandalojn. Ĉiam kiam li havis liberan horon, li faris tiajn sandalojn por la kamaradoj. Liaj sandaloj estis fortikaj kaj komfortaj, ĉiuj portantoj estis tre kontentaj pri ili.

Responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ pri produktado kaj kulturebligo de tero por memprovizado, la armeo mem solvis ankaŭ la problemon de lignokarbo uzata por hejtado dum vintro. Ĝang Side ĝoje akceptis la taskon de produkto de lignokarbo.

En la 5-a de septembro 1944, falis malfeliĉe la fornego por produkti lignokarbon, kaj glorie oferis sian vivon kamarado Ĝang Side.

Funebre al li, la rekte direktata institucio de CK de KPĈ okazigis kunvenon en la 8-a de septembro. Prezidanto Maŭ propramane faris surskribaĵon por la okazo: “Saluton al kamarado Ĝang Side, kiu oferis sian vivon pro la intereso de la popolo” kaj persone paroladis en la kunveno. La brila verko *Servu al la Popolo*, kiun ni publikigis en ĉi-tiu numero, estas la teksto de la nomita parolado farita de Prezidanto Maŭ.

Memoro pri Kamarado Ĝang Side

KAMARADO Ĝang Side estis granda komunisma batalanto elkulturita de la Partio kaj Prezidanto Maŭ. Mi estis lia batalkamarado en sama subplotono. La fragmentaj rememoroj ĉi-sube prezentitaj ĉiuj estas pri okazintaĵoj antaŭ pli ol 20 jaroj, tamen ili restas al mi ankoraŭ tiel freŝaj en mia memoro, kvazaŭ ili estus ĵus okazintaj. La ĉiam ridetanta kaj amika vizaĝo de Ĝang Side kvazaŭ montriĝas antaŭ miaj okuloj kaj lia sonora voĉo, plena je revolucia spirito, kvazaŭ ŝvebadas ĉe miaj oreloj.

Por la Komunisma Idealo

Laŭ mia memoro, nia subplotono konsistis el 12 personoj, el kiuj la plejparto estis junuloj 17- aŭ 18-jaraj. La 12 anoj venis el 8 provincoj — vere el “plej diversaj anguloj de nia lando”. Kamarado Ĝang Side, kies aĝo ne multe superis 20 jarojn, estis la plejaĝa el ni, sed sub lia gvidado nia subplotono fariĝis tute viglaspirita. Li bone scipovis fari ideologian laboron. Li estis lerta levi radikale la klasan konscion de la batalantoj, tial la membroj de la subplotono progresis rapidege. En nia subplotono, iu 16-jara kamarado Liuĉjo, nove aliĝinta al la armeo, estis tre timema. Li timis fantomojn kaj ne kuraĝis eliri sola en nokto. Pro tio, kamarado Ĝang Side diris foje en subplotona kunveno: “Ankaŭ mi timis fantomojn dum la infaneco. Sed poste, kiam la Ruĝa Armeo sub la gvido de Prezidanto Maŭ venis al nia gubernio, mi tre ĝojiĝis, nenion plu timis, kaj kuris, en profunda nokto, pli ol 15 kilometrojn por konduki la Ruĝan Armeon en nian vilaĝon. Tiam mi demandis al ruĝarmeanoj, ĉu ekzistas fantomoj. Ili diris al mi, ke en la mondo absolute ne estas fantomoj, se tiaj ekzistas, ili estas vivaj diabloj kaj demonoj, kiuj nin ekspluatas, nome la bienuloj kaj kapitalistoj, kaj ke Prezidanto Maŭ gvidis la Ruĝan Armeon marŝi norden ĝuste por batali

kontraŭ la japanaj diabloj. De tiam mi komprenas, ke la diabloj kaj dioj ĉiuj estas fabrikaĵoj de la bienuloj kaj aliaj reakciuloj por timigi nin malriĉulojn, ke ni ne kuraĝu revolucii kaj liberigi nin.”

“Ni estas popola armeo,” daŭrigis kamarado Ĝang Side per voĉo laŭtigita, “kaj ni timas nenion! Ni kredas nek diojn nek diablojn, ni kredas nur komunismon!”

Ĉiuj vortoj kaj ĉiuj frazoj de kamarado Ĝang Side rekte penetris en niajn korojn kaj tiel nin kortuŝis, ke bolis en ni la varma sango kaj ni sentis senliman forton en ni por frakasi tutecerte la malnovan mondon kun ĝiaj despotaj diabloj kaj demonoj. Salte leviĝis Liuĉjo kaj diris laŭte: “Prave vi diris, subplotonestro! En la mondo absolute ne estas diabloj. Nun mi jam travidis la trompan artifikon de la bienulaĉoj. Ekde nun, sendu min sola por kuriera tasko, en kiom ajn malluma nokto kaj por kiom ajn longa distanco. Mi ne timos!”

Por kulturi la kuraĝon de Liuĉjo, kamarado Ĝang Side persone iris kun li al Janĉi kaj Dingbian kiuj troviĝis 350 kilometrojn fore, por plenumi kurieran taskon. Ili trapasis profundajn montojn, densajn arbarojn kaj lokojn maldense loĝatajn, kaj sukcese plenumis sian taskon. Post tio, Liuĉjo iom post iom fariĝis kuriero kuraĝa kaj sagaca.

En 1942, kiam ni kulturebligis virgan teron ĉe Nannivan, en nia subplotono troviĝis nova kamarado kun familia nomo Han, kiu estis kutime tre vigla kaj ofte ludis sian memfaritan huĉinon (t. e. ĉina muzikilo kun du kordoj, ludata per arĉo) en liberaj horoj. Sed neatendite ne plu aŭdiĝis lia muziko en iu tago. Tiam kamarado Ĝang Side iris al li por fari elkoran interparolon. Malkovriĝis, ke Hanĉjo ricevis leteron de la hejmo kun la informo, ke japanaj diabloj “trabalais” lian hejmvilaĝon kaj forbruligis ĉiujn domojn, tial Hanĉjo eksopiris sian hejmon. Kamarado

Ĝang Side lin konsolis kaj diris krome: “Nun ne nur via familio kaj via vilaĝo suferas barbaraĵojn de la japanaj diabloj, sed ankaŭ la hejmvilaĝoj de multaj el la kamaradoj de nia subplotono, multaj lokoj kaj multaj samlandanoj suferas iliajn incendion, buĉadon kaj rabadon. La popolo de la tuta lando havos bonajn tagojn nur post forpelo de la damnindaj japanaj diabloj per firma rezistado. Vi devas skribi al viaj familianoj ke ili aktive partoprenu la rezistadon kontraŭ la japana invado. Kaj ni mem devas transformi la malamon en forton por bone plenumi la taskojn de trejnado, produktado kaj kuriero, kaj venki la japanajn diablojn per kuna strebado en la fronto kaj postfronto.”

Kaj tiuvespere li petis Hanĉjon laŭtlegi la leteron al la tuta subplotono por instrui per la faktoj la kamaradojn ke ili rezistadu la japanajn invadantojn sen ŝanceliĝo.

“Morgaŭ mi nepre kulturebligos pli da virga tero sur la monto,” diris decideme iuj batalantoj post la legado.

“Prave!” diris kamarado Ĝang Side. “Kulturebligi pli da virga tero ja signifas ekstermi pliajn japanajn diablojn.”

Tiu ideologia helpo ne nur stabiligis la sentimenton de Hanĉjo, sed ankaŭ agitis la produktan entuziasmon de la batalantoj de la tuta subplotono.

En la liberaj horoj post streĉa trejnado, produktado kaj lernado, kamarado Ĝang Side ofte gaje interbabilis kun la kamaradoj. Eĉ dum tiaj gajaj horoj li zorgis por levi nian politikan konscion. Foje, dum babilado oni ekparolis

pri la signifo de la vorto “revolucio”. Ĉiu havis sian apartan klarigon. Demandite, kamarado Ĝang Side diris: “Konduki revolucion signifas ne timi martiriĝon kaj havi la kuraĝon oferi sian vivon por la popolo. Efektive, en la tago de nia partopreno al la revolucio, ni jam donis nian vivon al la Partio kaj popolo. Nia partopreno al la revolucio ja celas faligi la bienulojn kaj kapitalistojn, kaj nun celas faligi la japanan imperiismon. Nia fina idealo estas starigi komunisman socion.”

Liaj vortoj forte nin inspiris.

Prizorgi, Ami kaj Helpi Reciproke

Kvankam kamarado Ĝang Side estis nia estro kaj veterana kamarado kiu partoprenis la Longan Marŝon, li tamen neniam postulis por si apartan trakton, sed ĉiam zorgis pri aliaj kaj eĉ pli bone ol pri si mem.

En la komenco de la somero de 1940, nia kuriera subplotono marŝis kun aliaj trupoj al la fronto ĉe Jaŭdianzi, ĉ. 25 kilometrojn fore en nord-oriento de Jan-an, por frakasi la intrigon de surprizatako kontraŭ Jan-an planitan de la banditaj trupoj de Ma Bufang. Iuvespere, la batalionestro ordonis kamaradon Ĝang Side, ke li tuj sendu kurieron al la Operacia Direktejo de la Ĉefstabo ĉe Vanggia-ping de Jan-an por transporti urĝan leteron, kaj li atentigis kamaradon Ĝang, ke ju pli frua plenumo estos des pli bona. Konsiderante, ke la batal-kamaradoj tre laciĝis post la ĵus finita tuttaga ekzerca manovrado, kamarado Ĝang Side decidis mem transporti la leteron. Rimarkinte, ke li ekprenis sian pafilon tuj post eniro en la kaverno-domo, ni demandis lin en hasto:

“Kien vi iros, kamarado subplotonestro?”

Avinjo Liu Guangjoŭ rakontas al la infanoj de la Liuhe-a Elementa Lernejo pri Ĝang Side, por kuraĝigi ilin ĉiam strebi al progreso.



“Al Jan-an, por porti urĝan leteron ĉi-vespere, kaj mi revenos morgaŭ frumatene.”

Mi kaj kelkaj aliaj tuj ĉirkaŭis lin kaj postulis, ke ni iru anstataŭe, sed li diris ankoraŭ: “Vi laciĝis kaj tuj ripozu. Mi ne lacas.” Tion dirante li elpaŝis kaj marŝis sur la vojon al Jan-an.

Dum la periodo de 1940 ĝis 1942, la financo kaj ekonomio de la liberigita limregiono renkontis plej grandan malfacilon. Estis malfacile por ni eĉ akiri grenojn, kaj ni havis nur ĝermiĝintan tritikon kiel manĝaĵon. Iutage kamarado Ĝang Side diris al mi: “Jen, lastatempe ni ekmanĝis ĝermiĝintan tritikon, kaj fariĝas ĉiam pli serioza la manko de greno. Tio ĉi estas nur malfacilo provizora, kaj ni, kompartianoj, devas doni bonan ekzemplon en batalo kontraŭ la malfacilo per redukto de nia manĝporcio.”

Mi kapjesis al lia opinio.

En plej malfacilaj tempoj, kamarado Ĝang Side zorgis unue ne pri si mem, sed pri la kamaradoj. La plej ĝojinda afero por li estas tio, ke li povas oferi siajn interesojn por la Partio, la popolo kaj la kamaradoj. Tiu ĉi lia granda komunisma spirito forte nin influis. Dank’ al la edukado de la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj sub la influo de kamarado Ĝang Side, la kamaradoj de nia tuta subplotono montris altan solidarecon dum la serioze malfacila periodo.

Ĉiufoje, kiam kamarado Ĝang Side trovis tempon, li tuj iris helpi la kuiran subplotonon en hejtado aŭ portado de akvo, helpi la bredistojn en manĝigo de la brutoj, kaj laŭtleĝi ĵurnalojn por ili aŭ rakonti al ili epizodojn pri la Longa Marŝo. Vidante, ke la barbiro kamarado Jang Dingĝong estis tro okupata laborante sola, li tuj prenis balailon por forigi la detranĉitajn harojn sur la tero.

Laŭ mia memoro, kamarado Ĝang Side laboris tre eminente en konstruado de la Granda Halo de la Okavoja Armeo kaj ricevis honoran prilaŭdon. Post la finkonstruo de la halo, la Pingĝju-opera Trupo de Jan-an faris prezentadon por regali la konstruintojn. Enirinte la halon, multaj kamaradoj okupis sidlokojn en la unuaj vicoj, sed kamarado Ĝang Side sidigis sin en la lasta vico. Plurfoje mi petis lin sidi en fronta vico, sed li firme rifuzis. Li diris al mi post la prezentado: “Ni, komunistoj, devas iri antaŭ la aliaj en laboro, sed lasi la unuajn lokojn al la aliaj kamaradoj en aferoj de vivkomforto kaj amuziĝo.”

La alta revolucia konscio montrita en la vortoj de kamarado Ĝang Side profunde tuŝis mian koron.

Prezidanto Maŭ nin instruas: “Niaj kadroj devas zorgi pri ĉiu batalanto, kaj ĉiuj en la revoluciaj vicoj devas zorgi, ame protekti kaj helpi unu alian.” Kamarado Ĝang Side agis ĝuste tiamaniere.

Agi Kiel Fidela Servanto de la Popolo

Ĝang Side estis bona lojala kamarado kaj vere meritas la nomon de fidela servanto de la popolo. Same en siaj ĉiutagaj kontaktoj kun la popolamasoj, li ĉiam kaj ĉie atente zorgis pri la intereso de la popolo, kaj servis al la popolo tutkore kaj plenanime.

En junio de 1940, ni marŝis, sub la gvido de kamarado Ĝang Side, revenvoje post plenumo de sarkado ĉe Heĝuangping en la nordo de Jan-an. Kiam ni atingis la bordon de la rivero Janhe, ni vidis, ke iu kamparano estis maltrankvile krianta kaj pelanta bovĉaron en la rivero. Ni konstatis, ke la radoj de la ĉaro profundigis en la ŝlimon dum transvado kaj la bruto neniel povis ilin eltreni malgraŭ vipado. La kamparano ŝvitis je la tuta kapo pro maltrankvilo. Kamarado Ĝang Side tuj kuris al li, saltis en la fluon sen formeto de siaj vestoj kaj ŝuoj, kaj komencis levi la ĉaron per sia ŝultro. Ni aliaj kamaradoj ankaŭ alvenis al ili tuj sekve, helpis la kamparanon per tirado kaj puŝado al la ĉaro, kaj baldaŭ jam surbordigis la bovĉaron. Viŝante la ŝviton sur sia kapo, la kamparano diris ĝoje: “Multajn dankojn. Mi morte maltrankviliĝis, mi timegis ŝveliĝon de la rivero!”

Post kiam la kamparano forkondukis la bovĉaron, kamarado Ĝang Side diris al ni: “Vidante kamparanojn en ia ajn malfacilo, ni devas elpaŝi kaj ilin helpi.”

Kaj plue li instruis nin per sia propra travivaĵo dum la Longa Marŝo: “Tiam la kuomintangaj reakciaj trupoj nin persekutis, iuj kamaradoj vundiĝis kaj ne povis iri kune kun niaj trupoj. Iuj vilaĝanoj meminiĉie kaŝis ilin. La malamikoj ĉiel klopodis en traserĉado por ilin trovi, sed ne sukcesis. Tio pruvis la veron en la instruo de Prezidanto Maŭ: La armeo amas la popolon kaj la popolo subtenas la armeon; ili vivas en solidareco kvazaŭ samfamilianoj.

Kamarado Ĝang Side ĉiam klopodis pliigi la amon de la popolamasoj al la armeo per siaj modelaj agoj. En profunda aŭtuno de 1941, ni venis al Nannivan por kulturebliki virgan teron. Iutage, batalionestro ordonis lin porti leteron al la Ĝenerala Politika Departemento en Jan-an. Li travadis fluojn, trapasis arbarojn, transiris la pli ol 10 kilometrojn longan monteĝon Ĵentaj, ĉe kies montpiedo sidis la vilaĝo Ĵentaj. Kiam kamarado Ĝang estis subiranta de sur la monto, li trovis,

ke iu maljunulino kun fasko de brulligno sur la dorso iras malfacile malsupren. Li tuj rapidigis la paŝojn, atingis ŝin kaj transprenis la faskon da brulligno. Li sentis, ke ĝi estas tro malpeza, tial li hakis ankoraŭ iom da brulligno el apudvojaj arboj por aldoni al la fasko kaj iris malsupren sekvante la maljunulinon.

Atinginte la hejmon de la avino, tiu ĉi nepre volis lin regali per manĝo, sed kamarado Ĝang Side ŝin ĝentile rifuzis.

Dankeme la avino diris: “Ĉiu el la anoj de la Okavoja Armeo amas nin, la popolon. Vi vere estas bonaj batalantoj edukitaj de Prezidanto Maŭ!”

Kamarado Ĝang Side diris responde: “Avinjo! Ni estas filoj de la popolo kaj devas servi la popolon. Mi ankoraŭ ne bone faras kion mi devas fari.”

Foje kamarado Ĝang Side portis leteron al Dingbian kaj Janĉi. Kiam li revenis al Jan-an, jam estis profunda nokto. Tamen li ankoraŭ ne manĝis. Senbrue li glitis en la kaverndomon kaj trovis, ke la kamaradoj dolĉe dormas. Li vidis, ke iuj kamaradoj forpuŝis per piedo siajn vatitajn litkovrilojn. Li tuj alrapidis kaj ordigis por ili la litkovrilojn. Poste, li ĉerpis plenbovlon da akvo, sidiĝis kaj ektrinkis.

Hazarde tiam ankaŭ mi revenis post plenumo de kuriera tasko. Enirinte la kaverndomon kaj vidinte, ke la subplotonestro jam revenis, mi paŝis al li por lin saluti. Sed li jam stariĝis kaj ekparolis la unua, firme premante mian manon:

“Kien vi iris? Kredeble jam laciĝis. Ĉu vi manĝis?”

“Mi ne lacas,” mi diris. “Mi ekiris, post la vespermanĝo, por porti urĝan leteron al Sanŝilipu. Kamarado subplotonestro, vi tro laciĝis. Eble vi ankoraŭ ne manĝis?”

Li skuis sian kapon kaj diris mallaŭte: “Ne, kompare kun Prezidanto Maŭ nia laciĝo ja estas nenio. Mi ĵus preterpasis Zaŭjuan kaj Jangĝialing kaj vidis, ke lampoj ankoraŭ brilas en la kaverndomo. Prezidanto Maŭ estas ankoraŭ laboranta en profunda nokto por la liberiga afero de la ĉina popolo! Mi sentis jam iom da laco antaŭe, sed vidinte la lamplumon, mi sentis varmon en la koro kaj oni ne scias de kie venintan grandan forton en mia korpo. Mi pensis, ke dank’ al Prezidanto Maŭ, la suferanta ĉina popolo certe liberiĝos plene. Kun tiu penso, ĉiam pli vigliĝis mia spirito, kaj mi venis al nia loĝejo sen rimarko pri la vojo”

Li preskaŭ larmis de emociiĝo, kaj li daŭrigis: “Je penso pri la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj pri la plena liberiĝo de la tuta popolo, ĉiom da laco kaj malsato formalaperas de mi, kaj ĉia ajn malfacilo kaj danĝero jam ne povas min ĝeni.” Aŭskultante liajn vortojn, ankaŭ mi ne povis min deteni de emociiĝo.

De tiuj jaroj, ĉiufoje kiam mi ekmemoras kamaradon Ĝang Side, mi ne povas regi mian emociion, kaj iufoje mi eklarmas nereteneble. La revolucia spirito de kamarado Ĝang Side en tuta kora kaj senrezerva servado al la popolo ĉiam kuraĝigas min en progresado. Li ĉiam restos lerninda ekzemplo por ni ĉiuj!


Servi al la Popolo

Kiel Ĝang Side

—Pri patrino Ĝang (Liu Guangjoŭ), kiu kreive studas kaj kreive aplikas la artikolon *Servu al la Popolo*

LIU Guangjoŭ, la adopta patrino de Ĝang Side, plej ŝatas legi la verkojn de Prezidanto Maŭ. Patrino Ĝang ne vizitis lernejon en la malnova socio, nun ŝi jam havas

73 jarojn, kaj havante nebonan memoron, ŝi lernas efektive kun granda malfacileco. Tamen ŝi lernas kun granda peno. Kiam vortojn en la libro ŝi forĝesis, tuj ŝi petis helpon de malriĉa



Liu Guangjoŭ, adopta patrino de kamarado Ĝang Side, jam 73-jara, ankoraŭ fervore lernas verkojn de Prezidanto Maŭ. Jen komunuma funkciulino legas por ŝi la artikolon Servu al la Popolo.

kampano aŭ malsupera mez-kampano, kiu povoscias legi. Ĉiuj junaj ruĝaj gvardianoj el aliaj lokoj rigardis tion kiel feliĉon, ke ili povas studi la artikolon *Servu al la Popolo* ĉe patrino Ĝang. Ankaŭ ŝi tre ŝatas kapti tiajn okazojn de kuna studado, ĉar tiuokaze la junaj revoluciuloj povas instrui al ŝi la nekonatajn vortojn. Ofte ŝi studas en vesperaj horoj. Kelkfoje ŝi recitas en la lito la lernitaĵojn kaj pripensas la revolucion veron en ĝi. Ĉiufoje, kiam patrino Ĝang legas, ŝi ion akiras. Ju pli multe ŝi legas, des pli profunde ŝi komprenas la sencon de la verko de Prezidanto Maŭ kaj des pli grandan fervoron havas por la lernado. Nun ŝi ne nur povas tralegi la tutan tekston de la artikolo *Servu al la Popolo*, sed jam komencis legi aliajn du verkojn de Prezidanto Maŭ *Rememore al Norman Bethune* kaj *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*.

En la pasinteco, patrino Ĝang faris multajn bonajn aferojn en la produkta brigado, kaj estis profunde estimata kaj amata de la amasoj. Post

la studo de la artikolo *Servu al la Popolo*, ŝi havis veran komprenon pri la neceso de la reformo de sia mondkoncepto. De tiu tempo, la maljunulino sentis sin ĉiam pli juniĝanta kaj la vivon pli signifplena. Antaŭe, ŝi opiniis ke prizorgo pri la kolektivo celas nur la feliĉon de la tuta vilaĝanaro, nun ŝi scias ke en la mondo du trionoj de la loĝantaro restas ankoraŭ suferantaj kaj turmentataj. Nur kiam imperiismo estos faligita kaj la tuta homaro liberigita, la malriĉaj kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj de Ĉinio povos vivi feliĉe. Celante rikolti pli multe kotonon por subteni la mondan revolucion, ŝi kultivis, pasintjare, eksperimentan kotonkampon kune kun siaj samkomunumanoj, dum la tempo de semado ĝis rikoltado, ĉiutage ŝi partoprenis la laborojn. Kiam ŝi laciĝis, ŝi ekpensis pri la monda revolucio, pri la faroj de sia filo Ĝang Side, kiu servis la popolon laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, kaj denove vigliĝis por persiste daŭrigi sian laboron. Dank' al la penado de ŝi kaj ŝiaj samkomunumanoj, tiu eksperimenta kampo pro-

duktis meznombro pli ol 210 ĝinojn da sensemigita kotono po muo.

Patrino Ĝang estas ankaŭ elstara propagandanto de la penso de Maŭ Zedong. Ŝi konstante propagandas, ke oni devas aŭskulti la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj servi al la popolo. Kiam ŝi trovas mankojn ĉe iuj homoj, ŝi povas ilin helpi laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ. Ekzemple, komunumano Gaŭ Ĵuĝi, malriĉa kamparano, laborante kiel zorganto pri forstado, kutime ellitiĝis tre frue kaj ĉesis labori tre malfrue en vespero li okupiĝis pri flegado kaj plantado de arbidoj, precipe de miskantoj (*Miscanthus sinensis*). Iuj rimarkis ke li malofte iras labori en kampoj, sed la tutan tagon vagas tien reen sur la monto, kaj ekopiniis kaj babilis inter si ke li estas mallaborema. Aŭdinte tion, Gaŭ Ĵuĝi estis tre malkontenta kaj sentis, ke li rikoltis ja mallaŭdon per sia penado, kaj ne volis plu zorgi pri forstado. Kiam patrino Ĝang informiĝis pri tio, ŝi petis lin reciti la lastan frazon de la tria paragrafo de la artikolo *Servu al la Popolo*.

Gaŭ Ĵuĝi do recitis jene: “Se ni nur persistas en ĉio bona kaj korektas ĉion malbonan por la interesoj de la popolo, niaj trupoj sendube prosperos.”

Tiam patrino Ĝang ekdemandis lin: “Ĉu vi kulturis arbidojn kaj miskantojn ne por la interesoj de la popolo?”

“Kompreneble jes,” diris Gaŭ Ĵuĝi.

“Jen vi havas!” diris patrino. “Se vi nur laboras por la interesoj de la popolo kaj efektive tiel agas, vi ne devas ŝanĝi vian koron, kiel ajn oni parolas pri vi. Se vi havas mankojn, forigu ilin, kiam oni montras ilin al vi. Kial do vi ne volas daŭrigi vian laboron? Mia infano, kiam ni studas la artikolon *Servu al la Popolo* de Prezidanto Maŭ, ni ne devas kontentiĝi nur je tio ke ni povas reciti ĝin, sed devas agi laŭ ĝi. Ĉu vi jam tiel faris?”

Gaŭ Ĵuĝi tre hontis, kiam li aŭdis la vortojn de patrino Ĝang, kaj diris: “Mi nepre aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ, lernos de Ĝang Side lian spiriton en servo al la popolo, kaj bone laboros estonte.”

Multfoje patrino Ĝang esprimis al samvilaĝanoj kaj vizitantoj: “Mi nepre bone studos la verkojn de Prezidanto Maŭ, agos laŭ lia instrukcio kaj iros la vojon de mia filo Ĝang Side.” Lastatempe la aĝulino komencis lerni ankaŭ skribon, la unuaj vortoj, kiujn ŝi ellernis skribi, estis: “Vivu Prezidanto Maŭ!”



Avinjo Liu Guangjoŭ selektas kotonsemojn kune kun la komunumaninoj.



Prezidanto Maŭ kaj kamaradoj Hysni Kapo (dekstre), Beqir Balluku (maldekstre) interparolas en granda intimeco.

**Prezidanto Maŭ Akceptis
Kamaradojn Hysni Kapo,
Beqir Balluku k. a.**

POSTTAGMEZE de la 3-a de februaro 1967, Prezidanto Maŭ Zedong akceptis kamaradon Hysni Kapo, membro de la Politika Buroo kaj de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro; kamaradon Beqir Balluku, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro, vicprezidanto de la Konsilantaro de Ministroj kaj ministro de Nacia Defendo; kamaradon Behar Shtylla, membro de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro; kamaradon Hito Cako, membro de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj ĉefo de la Politika Departemento de la Albana Popola Armeo; kaj ĉiujn membrojn de la Albana Milita Delegacio estrata de kamaradoj Beqir Balluku kaj Hito Cako.

Prezidanto Maŭ havis tre intiman kaj sinceran interparolon kun kamaradoj Kapo, Balluku, Shtylla kaj Cako k. a. Kamarado Kapo transdonis sincerajn bondezirojn de kamarado Enver Hoxha al Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ dankis lin kaj petis lin transdoni liajn plej korajn bondezirojn al kamarado Enver Hoxha.


La akcepton ĉeestis kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Kang Ŝeng, Je Gianjing, Hiaŭ Hua, Jang Ĉengvu, Vang Ŝuŝeng k. a.

La albana ambasadoro al Ĉinio kamarado Vasil Nathanaili ankaŭ ĉeestis.

Laŭ la invito de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kamaradoj Kapo kaj Shtylla atingis Pekinon la 13-an de januaro 1967. Kaj plene akirintaj plej altan revolucionan batalamikecon de la ĉina popolo al la popolo de Albanio, kamaradoj Kapo kaj Shtylla forlasis Pekinon la 7-an de februaro por reiri al sia hejmlando.

La 11-an de januaro 1967, la Albana Milita Delegacio estrata de kamaradoj Balluku kaj Cako alvenis en Pekinon. Post pli ol dudektaga amika vizito ili reiris al sia lando, la 10-an de februaro, plene akirintaj revolucionan batalamikecon de la ĉinaj armeo kaj popolo.

Prezidanto Maŭ fotiĝas kun kamaradoj Hysni Kapo (fronte la kvara de maldekstre), Beqir Balluku (fronte la kvara de dekstre), Behar Shtylla (fronte la dua de dekstre), Hito Cako (fronte la unua de dekstre) kaj aliaj kamaradoj el la Albana Milita Delegacio.



Tutmonda Popolo Varme



Kuvejta popolo amas Prezidanton Maŭ. Kuvejtanoj sentas sin plej feliĉaj ke ili povas esti fotitaj antaŭ la portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

KAMARADO Maŭ Zedong estas la plej granda marksist-leninisto en la nuna tempo. Li genie, kreive kaj plene heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninism-on, levante ĝin al tute nova etapo.


Revoluciaj popoloj en diversaj landoj senlime amas, respektas kaj adoras la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Multaj kortuŝaj aferoj okazantaj ĉiutage en diversaj lokoj de la mondo, spegulas tian sinceran senton de amo kiun la revoluciaj popoloj en diversaj landoj havas por li.

Mi Restos Ĉiam kun Prezidanto Maŭ

En la batalanta suda Vjetnamio, oni havas senegale profundan korinklinon kaj varman amon al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Iu bataliona komandanto de la Liberiga Armeo de suda Vjetnamio kunportis portreton de Prezidanto Maŭ, kiam li forlasis sian hejmlokon. Li partoprenis centon da bataloj kaj ĉiam tenadis atente la portreton en la sino kiel trezoron. Kiam iu ĉina raportisto lin vizitis, li elprenis zorge el sia taglibro tiun

Amas Prezidanton Maŭ



Nepalaj amikoj amas Prezidanton Maŭ. Jen laboristoj kaj kamparanoj de Nepalo salutas al lia foto.

portreton de Prezidanto Maŭ kaj diris kun emocio: “Jam pli ol kvin jarojn, en la ventoj kaj pluvoj de revolucio, sur la plej antaŭa fronto de la batalo kontraŭ la usonaj agresantoj, mi havis Prezidanton Maŭ kun mi tage kaj nokte! Mi restos ĉiam kun Prezidanto Maŭ, por ke Prezidanto Maŭ vidu la unuiĝon de nia patrio Vjetnamio kaj plenan venkon de la revolucio!”

Estas kudristino en suda Vjetnamio kiu naskis sian unuan bebon. Ŝi nomis ĝin Vjet-hoa (Vjetnamio-Ĉinio). Cetere ŝi petis iun ĉinan kamaradon fari por la eta Vjet-hoa

unuafaje foton kaj kunporti ĝin al Pekino. Ŝi diris: “Mi deziras ke mia infano amu Ĉinion kaj Prezidanton Maŭ ekde sia infaneco kaj ke ĝi sciu ke en la koroj de la revoluciaj popoloj de Ĉinio, la Oriento kaj la tuta mondo leviĝas la ruĝa suno.”

Transdoni Salutojn al Prezidanto Maŭ

Pasintjare, kiam la Delegacio de Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio de nia lando vizitis Baku, la ĉefurbon de Azerbajĝanio, parto de ĝiaj membroj, iris sur strato laŭ la bordo de Kaspia Maro en iu frua mateno, renkonte

venis grupo da sovetiaj laboristoj, kiuj iris deĵori. Unu maljuna laboristo diris kun emocio al la ĉinaj kamaradoj: “La laboristaro en Baku varme amas Prezidanton Maŭ kaj la ĉinan popolon, nur nia registaro ne permesas al ni amikiĝi kun Ĉinio. Bonvolu transdoni salutojn al Prezidanto Maŭ kaj la ĉina laboristaro!” Kiam unu ano de la delegacio donacis al li memorinsignon de “7-a Feb.”, kaj diris ke tiu insigno rememorigas pri revolucia movado de ĉina laboristaro, la maljuna laboristo flustris al la ĉina kamarado: “En la pasinteco, ankaŭ mi partoprenis en la revolucia batalado. Sed hodiaŭ necesas ĉe ni duafoja revolucio. Ni kredas, ke la penso de Maŭ Zedong povas nin helpi.”

Maŭ Zedong Estas la Marks kaj Lenin en Nuntempo

La popoloj de Rumanio, Germana Demokratia Respubliko, Pollando, Bulgario k. a. landoj ofte esprimas pere de diversaj rimedoj sian korsenton de senlimaj amo kaj estimo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Fine de la lasta jaro, la Ĉina Gejunula Tablotenisista Trupo faris amikan viziton al Rumanio. Ili renkontis multe da rumanoj kiuj diris frapante sian bruston “Maŭ Zedong! Maŭ Zedong!” por esprimi la amon al Prezidanto Maŭ. Iu funkciulo sinokupanta pri agronomio diris al la ĉinaj tablotenisistoj, ke la penso de Maŭ Zedong estas tute ĝusta. La monda situacio disvolviĝas ĝuste laŭ la antaŭvido de Prezidanto Maŭ Zedong. La historio pravas ke kamarado Maŭ Zedong estas tre granda. Ni treege respektas kaj admiras kamaradon Maŭ Zedong.



Revoluciaj junuloj de Japanio amas la verkojn de Prezidanto Maŭ.

Iu maljuna laboristo en Germana Demokratia Respubliko ĉiam portas surbruste insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ. Por esprimi sian amon al Prezidanto Maŭ, li pentrigis la portretojn de Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Maŭ Zedong pagante el lia pensio tute ne granda. Kun emocio li diris: “Nur Marks, Engels, Lenin, Stalin kaj Maŭ Zedong indas la nomon de gvidanto de la monda revolucio...”


Iu malnova membro de la Pola Unuigita Laborista Partio diris al ĉina kamarado: “Kamarado Maŭ Zedong estas la granda gvidanto kaj ĉefkomandanto de la internacia komunisma movado kaj la popolo de la tuta mondo.” Li aldonis: “Pensante pri la ekzisto de la Komunista Partio de Ĉinio kaj kamarado Maŭ Zedong en la mondo, ni malnovaj komunistoj pleniĝas de esperoj, firme kredante ke la komunismo certe rompos ĉiujn malfacilojn kaj finfine akiros kompletan triumfon en la tuta mondo.”

Ĉie en Bulgario, oni povas rimarki la varman amon kaj profundan respekton de la laboranta popolo al Prezidanto Maŭ. Iu emerita laboristo diris: “Maŭ Zedong estas la Marks kaj Lenin en nuntempo, kaj la Komunista Partio de Ĉinio estas la avangardo de la monda laboristaro.” Alia malnova komunisto fiere diris: “Mi estas partiano de Maŭ Zedong, ĉar la Komunista Partio de Ĉinio estas vera politika partio de marksism-leninismo.”

Por ke Pli Multaj Homoj Aŭdu la Voĉon de Prezidanto Maŭ

Okazis la jeno en Tokio, Japanio: Japana ŝoforo kaj lia edzino ambaŭ estas fervoraj aŭskultantoj de la porjapana disaŭdigo de la Radio-Pekino. Komence de la sesa horo en ĉiu vespero, la geedzoj eksidas apud la radioricevilo por aŭskulti la pekinan elsendon ĝis la dekdua. Ili registris sur sonbendoj la programojn dum aŭskultado kaj atente notis resumojn de

La armeo kaj popolo de Vjetnamio arde amas Prezidanton Maŭ kaj zorgas pri la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio. Jen ili rigardas fotojn de speciala rubriko "Prikanto al la Ruĝa Gvardio".



la elsendoj, por disdoni senpage al amikaj grupoj kaj individuoj. Ilia familio konsistas el kvar personoj kiuj kune loĝas en malgranda loĝejo. Kvankam malfacila estas ilia ĉiutaga vivo, tamen ili propagandis la penson de Maŭ Zedong al la japana popolo jam dum tri jaroj tiel regule kiel ili ĵus komencis ĝin. Ĉiumomente ili pensas ke estas ilia devo "ebligi al pli multe da homoj aŭskulti la voĉon de Prezidanto Maŭ kaj propagandi al pli multe da homoj la grandan penson de Maŭ Zedong". La ŝoforo diris ke ju pli la malamiko plene forstas mensogojn por kalumnii la grandan proletan kulturelan revolucion de Ĉinio, des pli ni sentas ke propagandi al la japana popolo la voĉon de vero estas nia glora devo.

Sub la Inspiro de Granda Nomo Maŭ Zedong

Sub la inspiro de la granda nomo Maŭ Zedong, multaj amikoj el Azio, Afriko kaj Latinameriko venas al Ĉinio unu grupo post alia. Kvar knabinoj el la sudokcidenta parto de Afriko ja venis al la nova Ĉinio de fora loko havante en la koro senlimajn respekton kaj amon al la granda gvidanto. Ili trapasis grandan sekan dezerton kaj primitivan arbaregon, timante nek la minacon de leonoj, nek la persekuton de polico kaj danĝeron de enkarcerigo. Ili venkis multajn malfacilojn en daŭro de pluraj monatoj, piediris milojn da lioj kaj fine alvenis en venko al Ĉinio kaj al la proksimeco de Prezidanto Maŭ.

Ruĝa Koro Dediĉata al Prezidanto Maŭ

En la tago kiam okazis la festado de la Deksepa Datreveno de la Fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko, iu juna metiartisto el Kongolando (Bra.) alportis kun siaj kamaradoj grandan portreton de Prezidanto Maŭ por donaci ĝin al la Ĉina Ambasadorejo. Tiun

ĉi portreton la juna metiartisto pentris dum tri tagoj kaj tri noktoj. Dekstre de la portreto estis pentritaj ruĝa koro kaj torĉo brulanta en flamoj. La juna metiartisto klarigis: "La ruĝa koro en la pentraĵo reprezentas la sinceran amon de la kongolanda popolo al Prezidanto Maŭ, kaj la torĉo simbolas flamantan revolucionan volon de la popolo de Kongolando (Bra.)." Li aldonis: "Ni nepre kondukos la revolucion ĝis la fino!".

Laŭvice Porti Portret-insignon de Prezidanto Maŭ


En Havano, ĉina kamarado renkontis en aŭtobuso kuban laboriston tridekkelk-jaran, sur kies brusto troviĝas insigno kun portreto de Prezidanto Maŭ, kiam li ekvidis ke la ĉina kamarado havas ankaŭ la insignon surbruste, li alparolis ĉi tiun kun aparta intimo: "Mian insignon donacis al mi iu ĉina kamarado antaŭ kelka tempo, kaj ĉiam mi portas ĝin sur mia brusto. Sed okazis ke foje mia edzino forprenis ĝin sen mia scio, ĉar ŝi tiom deziris ĝin porti. Malkovrinte tion mi tuj ĝin reprenis. Nelonge post tio, mia fratino ĝin forprenis denove. Kion fari? Ni tri personoj ĉiuj volas porti ĝin!" Li daŭrigis: "Ni amas Prezidanton Maŭ, ni deziras al li longan longan vivon. Ne nur ni tion deziras, tio estas espero de la kuba popolo." Kiam ĉina kamarado deprenis sian insignon kaj donacis ĝin al li, la lasta diris post kora dankesprimado: "Mi petas vin transdoni miajn salutojn al Prezidanto Maŭ, kaj mi deziras al li bonan sanon".



Gestudentoj el Azio, Afriko kaj Latinameriko studentaj en Rumanio amase vizitas ekspozicion de bildoj pri la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio.

En Malio, iu tabaklaboristo helpas siajn kolegojn solvi problemon per verko de Prezidanto Maŭ.

Batalantoj de la Palestina Liberiga Armeo studas la verkon Fajreroj Povas Disbruligi Stepon. Ili kredas, ke la popolo de Palestino certe venkos.






Jemenaj popolanoj rigardas fotojn pri akceptado al la ruĝaj gvardianoj fare de Prezidanto Maŭ. Ili ĝojkrias: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Prezidanto Maŭ estas la ruĝa suno en la koro de la monda popolo!"



Tri alĝeriaj kamparanoj, venintaj el malproksimeco de kelkdek kilometroj al la Ĉina Halo en la Tria Alĝeria Internacia Foiro, ŝatas legi verkon de Prezidanto Maŭ.

La 5-an de februaro, "Amikoj de Ĉinio" de Anglio okazigis en Londono la fondiĝan kunvenon. Jen la kunvenejo.



La Plej Granda Evento en la Homa Historio

—Fremdlandaj geamikoj en Pekino parolas, en kunsido,
pri la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio

Antaŭ nelonge, nombro da fremdlandaj geamikoj en Pekino kunsidis por interŝanĝi impresojn pri la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio. En la kunsido, Robert Williams kaj S-rino Williams el Usono, A. M. Kheir el Sudano, Sajonĝi Kinkazu el Japanio, Phayom Chulanont el Tajlando, Ibrahim Isa el Indonezio k. a. senĝene eldiris siajn impresojn kaj spertojn. Ĉi sube sekvas mallongigoj de iliaj paroloj:

Robert Williams el Usono:

La granda kultura revolucio de Ĉinio estas la plej granda evento en la homa historio. La ĉina granda kultura revolucio havas apartan signifon por mi, kiel observanto kaj ankaŭ kiel revoluciulo en Ĉinio kaj pro mia persona medio. Mi venis el la plej granda imperiisma, rasiisma kaj ekspluatista lando. Mi estas ne nur viktimo de la usona imperiismo kaj rasiismo, sed ankaŭ viktimo de la moderna reviziismo. Mi vidis propraokule, ke revolucia lando estas ŝanĝita, ne de tiuj, kiuj proklamas sin kapitalistoj, sed de tiuj, kiuj proklamas sin marksist-leninistoj sed efektive estas kapitalistoj. Ni devas esti ĉiam singardemaj kaj ne lasi la malamikojn en marksisma mantelo luĉi per la sorto de la monda revolucio.

Ĉinio estas granda bazloko de la monda revolucio. La granda kultura revolucio unuflanke donis baton al la malamikoj de la mondaj popoloj kaj aliflanke kuraĝigas la popolojn en batalo. Tiuj, kiuj oponas kontraŭ la penso de Maŭ Zedong kaj la ĉina popolo, ĉiuj estas malamikoj de la tutmondaj popoloj, kaj ni nepre devas batali kontraŭ ili en ĉiuj sferoj. Por protekti la bazlokon de la monda revolucio, ni nepre devas batali kontraŭ la malamikoj de la mondaj popoloj. Ni devas bone studi la verkojn de Prezidanto Maŭ kaj serioze klopodi por kompreni la penson de Maŭ Zedong.

Prezidanto Maŭ nin instruas: **“El pafiloj naskiĝas regpotenco.”** La subpremataj popoloj de la tuta mondo rigardas la venkon de la ĉina popolo kiel plej grandan kuraĝigon al si. Tial mi opinias, ke la granda kultura revolucio estas la plej granda evento en la homa historio. Mi ĝojas, ke mi povas vidi ĉi tie la grandan eventon en la homa historio.

Sinjinoro Mabe Williams:

Mi vidis la grandan demokration en la granda kultura revolucio. Farante ribelon, oni devas ne nur ribeli kontraŭ aliaj, sed ankaŭ kontraŭ si mem. Iuj ne kuraĝas fari revolucion, ĉar ili mem estas subpremantaj la popolon. En aliaj landoj, iuj buŝe babilas pri marksism-leninismo, kaj eĉ hipokrite tostas pro la revolucio, sed nur false, por trompi la popolon. Ili mem ne volas revolucii, kaj ankaŭ ne lasas aliajn konduki revolucion.

Unuvorte, la granda kultura revolucio plej forte min influas per tio, ke ĝi komprenigis al mi, ke oni devas revolucii profunde en la animo, ribeli kontraŭ si mem; ĝi sentigis al mi la potencon de la penso de Maŭ Zedong. Ni devas bone mastri la penson de Maŭ Zedong kaj nur tiel ni povos ĝin transdoni al nia propra popolo, ke tiu ĉi pli bone konduku la batalon.

A. M. Kheir el Sudano:

Milionoj kaj milionoj da popolanoj de la mondo atente observas la eventon okazantan en Ĉinio. La revoluciaj partioj, organizoj kaj milionoj kaj milionoj da revoluciaj popolanoj en la mondo bonvenigas la grandan kulturen revolucion de Ĉinio, varme ĝin subtenas, laŭdas, deziras al ĝi sukceson kaj volas lerni de ĝi. Sed la usona imperiismo kaj sovetia reviziismo malice ĝin atakas. La revoluciaj popoloj de la tuta mondo staras ĉe la flanko de la ĉina popolo, dum la sovetia reviziismo staras ĉe la flanko de imperiismo kaj la reakciularo. Prezidanto Maŭ diris: **“Ni subtenas ĉion, kion la malamikoj oponas; ni oponas ĉion, kion la malamikoj subtenas.”** Prezidanto Maŭ ankaŭ diris: **“Esti oponata de la malamikoj estas bona afero,**

sed ne malbona afero.” “Estas des pli bone, se la malamikoj nin oponas energie kaj asertas ke ni estas bonaj kaj pravaj en nenio, ĉar tio pruvas, ke ni ne nur strekis klaran dividlinion inter ni kaj la malamikoj, sed ankaŭ atingis tre grandajn sukcesojn en nia laboro.”

Prezidanto Maŭ donis, en la granda kultura revolucio, la rajton de granda demokratio al la ĉina popolo, tiel ke ĝi plene mobiliziĝis. Tia afero estas senprecedenca en la internacia komunisma movado kaj en aliaj landoj. Tia granda afero povas esti elmetita nur de la vere granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ĉar li vere fidis la popolamasojn. Ja kiu povas atendi ke la pledantoj por “tutpopola partio” kaj “tutpopola ŝtato” donu al la popolo tian demokratian rajton? Se ili tiel farus, ili estus tuj renversitaj de la sovetia popolo. Ni pripensu, kio okazus en Ĉinio, se ankaŭ Ĉinio kredus je “tutpopola partio” kaj “tutpopola ŝtato”? Al tio la respondo estas tre simpla kaj klara: tiam la ĉinaj diabloj kaj demonoj ektenus la regpotencon, subpremus la revolucion de la ĉina popolo kaj ŝanĝus la koloron de Ĉinio. Ĉu ne estas tre evidente, kian sorton la monda revolucio havus, se tiel irus la afero? El tio ĉi estas videble, kiel grandan signifon la ĉina granda kultura revolucio havas.

Tiu ĉi granda kultura revolucio estas revolucio kontraŭ la malamikoj ne kun pafiloj. Ĝi signifas disvolviĝon de marksism-leninismo kaj estas granda kontribuo al marksism-leninismo precipe en la problemoj pri partio kaj ŝtato.

La granda kultura revolucio de Ĉinio liveras al la popoloj de la socialismaj landoj valoran sperton en renverso de la regpotenco de la burĝaj potenctenantoj. Kun tiu ĉi sperto de la ĉina popolo, la aliaj socialismaj landoj povas relative facile konduki sian batalon. La ĉina granda kultura revolucio transformis Ĉinion en grandan lernejon

por lernado de la penso de Maŭ Zedong. En nur kelkaj monatoj, la granda kultura revolucio jam ege disvastigis la penson de Maŭ Zedong, kio estas neefektivigebla por miloj kaj miloj da lernejoj pri politika scienco.

La penso de Maŭ Zedong refoje riĉigis marksism-leninismojn kaj diris al la popolo, ke la rimedo kontraŭ kolorŝanĝiĝo de lando estas antaŭ ĉio revoluciigo de la penso de la homoj.

Sajonĝi Kinkazu el Japanio:

La granda proleta kultura revolucio de Ĉinio estas iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ. Sed en ĝia komenco, mi ne komprenis ĝian signifon. Kiam oni asertis en la frua periodo, ke la granda kultura revolucio tuŝos la animon de la homoj, mi ankoraŭ ne povis tion tuj kompreni. Sed pli poste, kiam la granda kultura revolucio disvolviĝis kaj mi kontaktis kun iuj amikoj, kaj precipe kun ruĝaj gvardianoj, mi iom komprenis ĝin. Tiu ĉi revolucia movado toleras neniom da kompromiso.

Nun, pli kaj pli multe da japanaj popolanoj komprenas, ke tiu ĉi movado estas akra klasbatalo. Ili ankaŭ vidas, ke la granda proleta kultura revolucio sin bazas sur la penso de Maŭ Zedong. Ne nur ili plene kredas, ke la ĉina popolo certe venkos en la granda kultura revolucio, sed ankaŭ la japanaj progresemuloj, junuloj, lernantoj kaj laboristoj sentas, ke ili devas studi la penson de Maŭ Zedong.

Krome estas ankaŭ nombro da personoj, kiuj sentas timegon pri la ĉina granda kultura revolucio kaj la penso de Maŭ Zedong. Ili estas la reakciaj fortoj en Japanio. Sed ĉiam pli multe da japanaj popolanoj komencis studi la penson de Maŭ Zedong. Nun en Japanio jam sin trovas multaj fondajoj kaj organizoj por lernado de la penso de Maŭ Zedong. En Japanio jam presiĝis kaj distribuiĝis kvin japanlingvaj malsamaj eldonoj de la ruĝa libro

Alilandaj geamikoj en Pekino kunvenas por diskuti pri la granda kultura revolucio de Ĉinio.



Vortoj de Prezidanto Maŭ. Antaŭe, la gvidantoj de la japana kompartio ĉiam gajnis profiton el vendado de tiaj libroj, sed nun ili malpermesas vendi ilin. En Japanio la reviziistiĝintoj kaj la re-akciuloj tre timas tiun ĉi libron, sed la popoloj kiuj arde amas sendependecon kaj progreson kaj la revoluciuloj tre ŝatas ĝin kaj ĝin lernas serioze.

Tiu ĉi granda kultura revolucio havas grandan signifon ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por ĉiuj de la mondo, kiuj batalas por sendependeco kaj liberigo kaj volas revolucion.

Phayom Chulanont el Tajlando:

La granda proleta kultura revolucio de Ĉinio estas peza bato al imperiismo kaj la moderna reviziismo kaj ankaŭ peza bato al la tuta kapitalisma sistemo. La ĉina granda kultura revolucio celas forigi la reviziisman radikon, kiu korodas la socialisman regpotencon de la ĉina popolo, por ke Ĉinio ne ŝanĝu sian koloron kaj ne degeneru en kapitalismon kiel Jugoslavio kaj Sovetunio el la socialismaj landoj.

En la mallongaj naŭ monatoj, la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio jam profunde kaj vaste disvolviĝis en la amasoj de la sepcent milionoj da ĉinaj popoloj. La proletaj revoluciaj ribelantoj sub la gvido de Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio jam deprenas la regpotencon for de la manoj de la plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, por ke la regpotenco estu tenata en la manoj de la ĉinaj proletaj revoluciuloj rekte sub la gvido de la granda Prezidanto Maŭ Zedong. Tiu ĉi granda venko igos la ĉinan revolucion fari grandan paŝon antaŭen, faros la Ĉinan Popolan Respublikon ankoraŭ pli potenca kaj faros ĝin plej potenca kaj granda citadelo kontraŭ imperiismo kaj la moderna reviziismo, plej fortika citadelo en subteno al la monda revolucio.

La subpremata kaj ekspluatata revolucia popolo de Tajlando neniom ŝanceliĝas antaŭ ĉiaj propagandoj distordantaj kaj kalumniantaj la grandan proletan kulturalan revolucion de Ĉinio. La patriota kaj revolucia popolo de Tajlando fidus la grandan ĉinan popolon, kiu oponas la usonan imperiismon, la sovetian reviziismon kaj ĉiajn reakciulojn.

La instruo de Prezidanto Maŭ ke “el pafiloj naskiĝas regpotenco” kaj “fajrero povas bruligi vastan stepon” jam estas aplikataj de la popolo de Tajlando en praktikado de socia batalo. En 1965, revolucia fajro ekflamis unue en la nordorienta parto kaj poste bloviĝis suden kaj arde brulegis tie.

En 1967, la fajreroj en la suda parto disvastiĝas al la meza parto kaj fariĝas vasta incendio kaj englutos la tutan landon. La revolucia fajrego certe cindrigos la usonajn agresantojn kaj la naciperfidan klikon de Thanom kaj Praphas.

Ibrahim Isa el Indonezio:

La granda proleta kultura revolucio de Ĉinio koncernas ne nur la sorton de la ĉina popolo, sed ankaŭ tiun de la popoloj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj la ceteraj partoj de la tuta mondo. Ĉar la gvidanta kliko de Sovetunio, la unua en la mondo socialisma lando, perfidis marksism-leninismen kaj perfidis la revoluciajn popolojn de la mondo, tial la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio havas ankoraŭ pli grandan signifon. La granda kultura revolucio ankaŭ enkorpiĝis la respondecon de Prezidanto Maŭ al la revoluciaj popoloj de la mondo. Prezidanto Maŭ scias, ke Ĉinio ne devas ripeti la eraran vojon de Sovetunio, sed devas fariĝi citadelo firmiganta la mondan revolucion. Nun la plej potenca revolucia citadelo en la mondo estas la Ĉina Popola Respubliko. Kio okazus al la mondo, se Ĉinio prenis eraran vojon? Ĝuste el konscio pri la respondeco al la revoluciaj popoloj de la mondo, Prezidanto Maŭ persone iniciatis kaj gvidas tiun ĉi grandan kulturalan revolucion. Prezidanto Maŭ diris, ke ĉiam ajn revolucia ribelo estas prava, eĉ ankaŭ en la socialismaj landoj. Eble ĝuste pro tio, la reviziistoj ĝismorte teruriĝis. La grandeco de Prezidanto Maŭ prezentiĝas ne nur en tio, ke li elmetis la tezon, ke revolucia ribelo estas prava, sed ankaŭ en tio, ke li subtenas kaj kuraĝigas tian spiriton de revolucia ribelo.

Kaj la granda kultura revolucio ankaŭ pruvis la tezon elmetitan de Prezidanto Maŭ, ke “la popolo, nur la popolo estas la movforto kiu kreas la mondan historion” kaj “la amasoj estas veraj herooj”.

Mi sentas honoron, ke mi loĝas en la ruĝa Ĉinio. Pere de la granda kultura revolucio, la ruĝa Ĉinio restos ĉiam ruĝa. Ĉinio fariĝos ankoraŭ pli solida kaj potenca. Ni vere tre ĝojas vidi, ke pere de la granda kultura revolucio, la penso de Maŭ Zedong disvastiĝas ne nur tra Ĉinio sed ankaŭ tra la tuta mondo inkluzive de Indonezio.

Willy Hariandja el Indonezio:

La granda kultura revolucio de Ĉinio estas enkorpiĝo de la penso de Maŭ Zedong. Ĝi ne nur fortikigas la citadelon de la monda revolucio sub la gvido de Prezidanto Maŭ, sed ankaŭ koncernas la popolojn kiuj batalas por la proleta diktaturo.

Post Transpreno de Potenco

RESPONDE al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, la revoluciuloj de Guanghua-a Lignaĵa Fabriko en Pekino deprenis, la 17-an de januaro, 1967, la potencon de la manoj de areto da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Post la transpreno de la potenco, la tutan fabrikon regas prosperiĝo de produkto.

Dum Revoluciuloj Tenas Potencon, Ege Disvolviĝas Produktado

Jam delonge, plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon en Guanghua-a Lignaĵa Fabriko, fidele plenumis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de la malnova Pekina Urba Komitato de la Partio, irigis la socialisman entreprenon sur la vojon de "paca evoluo". En la granda proleta kultura revolucio, kiam la revoluciuloj ekribelis kontraŭ ili, la lastaj freneze subpremis ilin praktikante blankan teroron. La revoluciuloj tion ne timis. Tiam, la potenctenantoj ekpraktikis ekonomismon, agitis por ĉesigi la laboron kaj saboti la produktadon. Ili povas tion fari, ĉar ili havas potencon en

la manoj. Do estas absolute necese, ke ilia potenco devas esti nepre deprenita!

Nur kiam la potenco estas tenata en la manoj de la proletaj revoluciuloj, oni povas efektive realigi la grandan principon "**firme teni la revolucion kaj stimuli la produkton**" elmetitan de Prezidanto Maŭ.

Kiam la potenco estas tenata en la manoj de la proletaj revoluciuloj, la produktaj fortoj estas grandmezure liberigitaj. La aktiveco en produkto ĉe la vasta amaso de laboristoj, vigligita de la granda proleta kultura revolucio, estas la plej grava faktoro por bone irigi produkton.

Post la venko en batalo por transpreno de potenco, tuj leviĝis alta tajdo de produkto en la tuta fabriko. Multaj laboristoj diris kun emocio: "Nun ni efektive fariĝis la mastroj. Kiu agus, se ne ni? Ni devas agi energie!" La laborsekcio 301 kiu produktas tabulajn pordojn, en la dua tago post la transpreno de la potenco, plimultigis sian potagan produktkvanton de 115 pecoj ĝis 210, en la tria tago ĝis 253 pecoj kaj tre baldaŭ aperis la plej alta rekordo de 282 pecoj, tio estas 245% de la potaga produktkvanto de la

Prezidanto Maŭ diris: "La popolo, nur la popolo estas la movforto kiu kreas la mondan historion." Tiun ĉi vaste konatan instruon de Prezidanto Maŭ mi legis antaŭ longe, sed propraokule vidinte la grandan proletan kulturalan revolucion de Ĉinio, mi akiris pli profundan komprenon pri ĝi.

En la granda kultura revolucio, la sepcent milionoj da popolanoj partoprenas la grandan debaton kaj studas la penson de Maŭ Zedong. Tio

ĉi mem havas tre gravan signifon. Nun mi komprenas, ke oni devas fidi la popolon, sin apogi sur la propraj fortoj kaj esti kuraĝaj en konduko de batalo. Ni devas lerni de la amasoj kaj esti iliaj humilaj lernantoj. La modernaj reviziistoj kalumnias distordante la faktojn, ke Ĉinio mobilizas la junulojn akre kritiki "spertajn kadrojn", kaj per tio ili atakas la grandan kulturalan revolucion. Sed ĝuste kiel Prezidanto Maŭ diris, la historio antaŭeniras, kaj ni devas lerni senĉese.



Servantoj lernas el la ĵurnalo kune kun la amaso.

tago antaŭ la transpreno de la potenco. Ĉiuj laborejoj de la fabriko plenumis aŭ superplenumis sian taskon de produkto.

Kiam la komunisma spirito de la laborista amaso, kiu fariĝis efektive mastroj, estas en plena disvolvo, progresas ankaŭ teknikaj renovigoj. Dank' al nova metodo de rapida duobla volva mortezado kreita de la revoluciuloj, kiuj manipulas la meztipan tabulan mortezilon, duobliĝis la efikeco de la koncerna laboro. Kiam la meztipa kaj grandtipa termopremaj maŝinoj de la gluprema sekcio difektiĝis, kamaradoj de la serurista grupo tuj alrapidis por fari urĝan riparon dumnokte kaj tiel garantiis la normalan funkciadon de la maŝinoj. Post antaŭtempa superplenumo de sia produkta tasko, la laborsekcio 307 meminitate sendis siajn lignaĵistojn por helpi la laborsekcion 303.

Revolucia-Produkta Komitato kaj Revolucia-Produkta Servanta Grupo — Tute Novaj Aferoj

Prezidanto Maŭ diris: “Ni ne nur estas lertaj en detruo de malnova mondo, sed ankaŭ

montriĝos lertaj en konstruo de nova mondo.” Post transpreno de la potenco, la revoluciuloj de Guanghai-a Lignaĵa Fabriko vaste detruis la superstrukturon kiu ne konvenas al la socialisma ekonomia bazo kaj la malnovajn regulojn kaj sistemojn, ĝisfunde abolis la “solestran sistemon en tri niveloj” longe regantaj en la entrepreno kaj ĝin anstataŭigis per tute novaj organizaĵoj — la Revolucia-Produkta Komitato kaj Revolucia-Produkta Servanta Grupo.

La malnovan administran sistemon kiu estis burokrata sistemo, katenis la amason kaj malhelpis la produkton, oni enportis de la sovetuniaj reviziistoj. De la nivelo de fabriko ĝis tiuj de administraj fakoj kaj laborejoj estis granda nombro da neproduktaj funkciuloj, kiuj ne kontaktis kun laboristoj,

restis alte kiel grandaj sinjoroj kaj scias nenion pri la produkta praktiko, krom ŝarĝi taskojn al malsupera nivelo. Anstataŭ ili nun stariĝis Revolucia-Produkta Komitato aŭ Revolucia-Produkta Servanta Grupo.

La Revolucia-Produkta Komitato kaj Revolucia-Produkta Servanta Grupo havas sange kaj karne intimajn rilatojn kun la amaso kaj eĉ momenton ne apartigas sin de la amaso. Hodiaŭ, la rilato inter gvidantoj kaj gvidatoj estas nenio alia ol tiu inter kamaradoj, kaj absolute ne tiu inter regantoj kaj regatoj. Ne malmultaj servantoj diris: “Nun ni mem estas la mastroj, ni devas neniel agi grandsinjore nek apartigi nin de la amaso.”

El la servantoj de la Revolucia-Produkta Komitato kaj la Revolucia-Produkta Servanta Grupo la plejparto ne forlasas sian propran laborpostenon, escepte de apartaj personoj kiuj devas tion fari portempe pro nepraj bezonoj. Plejparto de la servantoj kondukas la kulturan revolucion kaj pritraktas la produktajn problemojn ĝenerale en postlaboraj horoj.

Ĉar la servantoj rekte partoprenas mem la produktadon, ili plej bone konas la staton

de produkto kaj la laboristan amason, tial ili povas plej bone direkti la aferon. Ili konsiliĝas kun la amaso por solvi malfacilaĵojn, strikte sin apogas sur la amaso kaj tial estas en pozicio por facile disvolvi la aktivecon kaj kreivon de la vastaj amasoj. Se ia problemo leviĝas en produkto, oni povas rapide solvi ĝin, kaj la gravaj problemoj estas submetitaj al la Revolucia-Produkta Komitato de la fabriko kaj povas esti ankaŭ solvitaj ĝustatempe. Tio ĉi estas ankaŭ grava kialo ke la produkto povas rapide disvolviĝi post la transpreno de la potenco. La laborista amaso konstatis: “Nun la produkto en la tuta fabriko estas senĝene direktata kaj instrukcioj estas ĝustatempe farataj.”

La Revolucia-Produkta Komitato kaj Revolucia-Produkta Servanta Grupo estas novaj aferoj naskiĝintaj en la granda proleta kultura revolucio. Ili havas profundan bazon inter la amasoj kaj brilan estontecon. Ili manifestos senegale grandan forton en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

“Ŝpare Fari la Revolucion”, “Pene kaj Ekonomie Funkciigi Fabrikon”

Post kiam la revoluciuloj ektenis la potencon, ili firme sekvas la instruon de Prezidan-

Laboristoj el la Sekcio N-ro 301 estas sur sia posteno de produktado.



to Maŭ “Ŝpare fari la revolucion” kaj “Pene kaj ekonomie funkciigi fabrikon”.


En Guanghai-a Lignaĵa Fabriko, la Revolucia-Produkta Komitato de la fabriko decidis post transpreno de la potenco, ke oni veturu per aŭtobuso aŭ biciklo, sed ne per aŭtomobilo, escepte en aparte urĝa okazo. De post la transpreno de la potenco, oni malofte uzas aŭtojn de la fabriko.

Ankaŭ paperojn, presikon k. s. uzatajn por la kultura revolucio oni konsumas kiel eble plej ŝpare. Malŝparemo estas severe malkonsilata. La oficejoj kaj kunsidejoj estas simple meblitaj nur per kelkaj lignaj tabloj kaj seĝoj.

La revoluciuloj afiŝis la vortojn “Ŝpare fari la revolucion” de Prezidanto Maŭ apud maŝinoj. Laboristoj diris: “Ni konduku plej bone la revolucion, sed uzu nian monon plej malmulte. Por kio la revolucio, se ni malŝpare elspozos!”

Nuntempe, la laborista amaso pli forte konscias sian devon kiel mastroj kaj ne permesas malŝpari eĉ pecon da brulligno aŭ tabulo kiu apartenas al la fabriko. La revoluciuloj de la Sesa Laborejo ne petas plu de la ŝtato bonkvalitan karbon. Ili diras: “Se ni nur disvolvas la subjektivan iniciatemon, ni povas hejti la kaldronegon tute egale bone per malpli bonkvalita karbo.” Ŝparado de krudaj materialoj fariĝis ankaŭ ilia komuna kutimo.

Popola servanto Vej Hiuhe (dekstre)



Lukso kaj malŝparemo estas stilo de la burĝaro, tiel agis la mandarenaj moŝtoj en la pasinteco.

Diligenteco, ŝparemo kaj ekonomio estas stilo de la proletaro, tiel agas la potenctenantaj laboristoj en la nuna tempo.

Unuigu la Plejparton de Amasoj

En Guanghua-a Lignaĵa Fabriko oni transprenis la potencon en efektiveco. La revoluciuloj ne nur transprenis la sigelilojn kaj oficĉambrojn, sed efektive enmanigis la gvidan potencon. La plejparto de la laboristoj varme subtenas la transprenon de la potenco, plezure obeas la aranĝojn deciditajn de la Revolucia-Produkta Komitato kaj la Revolucia-Produkta Servanta Grupo. Alivorte, la potenco estas sankciita de la amaso.

Kial tio estas ebla? Ĉar antaŭ ol la revoluciuloj transprenis la potencon, ili atentis pri unuiĝo kun la plejparto, kaj post tio, ili pli atentis fari tiun laboron kaj ĝin fari pli profunde kaj subtile.

En la fabriko, la plej parto el tiuj kiuj aliĝis al la konservativulaj organizaĵoj, estas tiam trompitaĵ, tial la revoluciuloj ne maleslimas kaj ekskluzivas ilin, sed konvinkas, edukas kaj unuigas ilin surbaze de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La revoluciuloj faris ankaŭ analizon pri funkciuloj por trakti ilin adekvate. Iujn el tiuj kiuj decideme staras ĉe la flanko de la revoluciuloj, oni elektis en la Revolucian-Produktan Komitaton aŭ Revolucian-Produktan Servantan Grupon. Tiuj, kiuj ne grave kulpis kaj estas bezonataj en laboroj, estas allasitaj por plenumi ian oficon; kaj tiujn, kiuj ne estas bezonataj, oni sendis senescepte en laborejojn por tie labori kune kun la laboristoj. Kontraŭ plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, oni faris kritikon kaj batalon, kaj ili devas labori sub kontrolo de la amaso kaj skribi konfesojn pri siaj eraroj. Tiel, la revoluciuloj sukcesis gajni al si nombron da funkciuloj.

Post la sukceso de la transpreno de la potenco, rapide plivastiĝas la revolucia vicaro. Multaj petas amase aliĝi al la revoluciularo. Sub tiaj kondiĉoj, la revoluciula organizaĵo devas kaj atenti pri sia amasa karaktero kaj pri sia pureco. Ĉiu kiu sincere deziras aliĝi al la

revoluciularo, eĉ se li estas antaŭe trompita, renkontas varman akcepton de la revoluciuloj se li nur ŝanĝis sian starpunkton. Oni devas, tamen, esti singardema pri tiuj, kiuj sub la flago de "revolucio" intencas sin miksi en la revolucian vicaron por fari subfosadon.

Seninterrompa Revoluciado kaj Ĉiama Antaŭeniĝo

Estis verkoj de Prezidanto Maŭ kiuj donis al la revoluciuloj de la fabriko senliman forton kaj ebligis al ili "fari firman decidon, timi neniuon oferon kaj konkeri ĉiujn malfacilojn por akiri venkon", dum plej malfacila vivmorta batalo kontraŭ plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Nun la revoluciuloj jam tenas la potencon kaj pli peza fariĝis la ŝarĝo de respondeco sur ilia ŝultro. Kiel oni povas plenumi la taskon? La plej plej grava afero inter la plej gravaj estas meti la penson de Maŭ Zedong en la loko de komandanto.

Post la transpreno de la potenco Guanghua-a Lignaĵa Fabriko turnis sian ĉefan atenton, antaŭ ĉio, al la studo de verkoj de Prezidanto Maŭ. Lige kun la praktiko, oni serioze pristudis liajn grandajn verkojn: la "tri malnovajn artikolojn", *Pri Ĝustigo de Eraraj Pensoj en la Partio*, *Pri Kelkaj Problemoj de Gvidaj Metodoj*, *Labormetodoj de la Partia Komitato* k. a. Same kiel multaj aliaj revoluciuloj, la 52-jara laboristo Vej Hiuhe, servanto de la Revolucia-Produkta Komitato ofte studis ĝis profunda punkto. Li diris: "Kiel oni povus preni sur sin la taskon de servanto, se oni ne studus verkojn de Prezidanto Maŭ?"

En la nova situacio, povos aperi novaj ideologiaj problemoj. Prezidanto Maŭ diris: "**Kaŭze de la venko, eble kreskos en la Partio fiereco kaj la emoj: rigardi sin kiel meritulon, halti duonvoje nevolante plu progresi, kaj vidi vivĝuon nevolante plu vivi malfacilan vivon.**" Ĝerموj de tiaj eraraj pensoj ekzistas pli aŭ malpli serioze ankaŭ inter la revoluciuloj. Tio vekis jam atenton de la revoluciuloj, kaj ili profunde kredas ke dank' al studado de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj disvolvado de kritiko kaj memkritiko, oni povas certe venki tiujn erarajn pensojn kaj eltenos pli rigoran provon. La revoluciuloj de Guanghua-a Lignaĵa Fabriko nun iras renkonte al novaj bataloj.


Vortoj de Prezidanto Maŭ

Sen popola armeo la popolo havas nenion.



En firma respondo al la alvoko de k-do Lin Biaŭ, Maj Hiande (meze) decidis fari revolucion kaj studi la verkojn de Prezidanto Maŭ dum la tuta vivo por ke la penso de Prezidanto Maŭ fariĝu sia propra animo.

Ŝtala Batalanto Maj Hiande



Vundite ĉe la frunto kaj duone perdinta la konscion, Maj Hiande kun mirinda persistemo trovis dum ekzamenado unu el multnombraj malgrandaj ŝraŭboj malfirmiĝanta, kaj refirmigis ĝin por ĝarantii la normalan funkciadon de la maŝino.



Maj Guanggin, la patro de Maj Hiande, diris al sia filo: "Por ĉiam aŭskultu la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj klopodu pli frue reiri al la fronto por pli grandkvante ekstermi la malamikojn!"



Maj Hiande neniam forgesis la fronton kaj sian taskon. Li ĉiutage faras gimnastikajn ekzercojn por pli frue reiri al sia posteno.



Maj Hiande atente aŭskultas la deklamadon de la juna pionirino, kiu venis kun siaj kolegoj por konsoli lin.

Ruĝaj Soldatetoj en Longa Marŝo

EN entuziasma respondo al la alvoko de Prezidanto Maŭ, pere de sia landskala interkon-takto, precipe piedira, por interŝanĝi revoluciajn spertojn, ruĝaj soldatetoj de Prezidanto Maŭ kunligiĝas kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, vaste propagandas la penson de Maŭ Zedong kaj la proletan revolucion linion de Prezidanto Maŭ, kaj forte antaŭenpuŝas la grandan proletan kulturalan revolucion.

La ruĝaj standardoj de la ruĝaj gvardioj en longa marŝo flirtas tra la tuta lando, kaj ankaŭ sude kaj norde de Tianŝan-montaro. La membroj de la dekoj da longmarŝaj trupoj de diversnaciaj junuloj de Hingiang, marŝas kun koro plena de revolucia sento kaj spite al malfaciloj kaj obstakloj, tra la dezerto Gobio, trans altajn montojn kaj grandajn riverojn. Ili marŝas al Pekino, la ĉefurbo de nia granda patrolando, la centro de la granda proleta kultura revolucio kaj la loko, kie loĝas nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

La Fortoj Devenas de la Penso de Maŭ Zedong

Longa marŝo estas vojo kreita de la veterana Ruĝa Armeo sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj revolucia vojo peniga. Sed post la studado de la penso de Maŭ Zedong, la junaj revoluciaj batalantoj decidis venki ĉiajn malfacilojn kaj malhelpojn, trapasi la provon de revolucia ŝtormo kaj marŝi antaŭen sur la vojo kreita de Prezidanto Maŭ.

Kiam longmarŝa trupo de la Hingiang-a Universitato atingis la ĉirkaŭaĵon de la Sala Lago, ĝi renkontis potencajn neĝoŝtormojn, kaj la temperaturo subite malaltiĝis. Vidante la trupon, la preterpasantaj ŝarĝaŭtoj kaj pasaĝeraj aŭtomobiloj ĉiuj haltis, kaj la ŝoforoj kaj pasaĝeroj invitis ilin enaŭtiĝi, sed ĉi tiuj ĝentile rifuzis. Ili pensis: Se dum la Longa Marŝo de 25,000 lioj (lio = duonkilometro), la Ruĝa Armeo sub la gvido de Pre-

zidanto Maŭ povis transpasi neĝmontojn kaj marĉozan stepon kaj venki aliajn naturajn barojn, malgraŭ blokado kaj persekutado de la malamikoj, kial ni, ruĝaj soldatetoj de Prezidanto Maŭ, ne povas venki eĉ tian bagatelan malfacilon? Ili luktis pli ol du horojn kontraŭ la neĝoŝtormo kaj finfine atingis la etapon.

Por hardi sian eltenemon de grandaj malfaciloj kaj penigoj kaj la revolucion persistemon, longmarŝa trupo de Ĉanggi-mezlernejo preferis marŝi laŭ zigzaga vojeto trans pluraj montetoj, anstataŭ laŭ ŝoseo glata. Kiam la trupanoj iom laciĝis dum transgrimpo de la tria monteto, la estro gvidis la anojn laŭtleĝi jenan citaĵon el verko de Prezidanto Maŭ: **“Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen; ĝi premfaligos ĉiujn malamikojn, sed ne submetiĝos al la malamikoj.”** Ili agis laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, venke transgrimpis la lastan monteton kaj marŝis plu antaŭen.

Lernadi de la Laboristoj kaj Kamparanoj

Kamarado Lin Biaŭ diris: **“La piedira interkontaktado estas bona en tio, ke oni povas havi vastan kontakton kun la popolamasoj, kontakti diversajn sferojn de la socia vivo kaj akiri pli profundan komprenon pri la klasbatalo en socialisma socio. Oni povas pli bone lerni de la laboristoj kaj kamparanoj kaj disvastigi la penson de Maŭ Zedong en pli vasta sfero . . .”** La membroj de la trupo agis, dum la longa marŝo, severe laŭ la instrukcio de kamarado Lin Biaŭ.

Je atingo de ĉiu loko, la membroj de la longmarŝaj trupoj faras vizitojn al la suferintaj malriĉuloj por koni ilian mizeran pasintecon, vaste kontaktas kun la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj por lerni de ili aŭ vizitas ekspozicion de klasa edukado. Iuj anoj invitas aktivulojn de studo pri verkoj

de Prezidanto Maŭ al kunsido por interŝanĝi spertojn en kreiva studado kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Ili firme decidis sin hardi kaj remuldi en la granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong por fariĝi fidindaj daŭrigantoj de la afero de proleta revolucio laŭ la espero de Prezidanto Maŭ.

Iuj junaj revoluciaj batalantoj vidis en la Tianŝan-a Popola Komunumo de Urumĉi, ke iu aĝa analfabeta kamparano scipovas parkere reciti la "tri malnovajn artikolojn" kaj dekojn da citaĵoj el verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj aŭskultis rakonton de komunumanoj pri ilia konstruo de centoj da muoj da teraskampoj kun la spirito de la Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn. En la fame konata regiono de ventoj, ili vidis propraokule, kiel la fervojistoj venkis atakon de ŝtormo per kortuŝa batalo. Por teni la signallampon ĉiam briladi, signalistoj surgrimpis semaforajn fostojn spite al la ŝtormo, la vojpatrolistoj persistis sur sia posteno, por garantii, ke senĝene veturadu la vagonaroj plenŝarĝitaj per diversnaciaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj materialoj por subteni la konstruadon de la lando.

El paroloj de la fervojistoj, kiuj vivas en varmego kaj frostoj sur la dezerto Gobio, la junaj revoluciaj batalantoj komprenis, ke kompare kun la klasaj suferoj en la malnova socio, ĉi tiuj malfaciloj ja estas bagatelaj. Kaj el tio ili lernis kritiki, per la penso de Maŭ Zedong, la egoisman penson: "Antaŭ ĉiu afero, unue kalkuli por si mem kaj poste por la aliaj."


La junaj revoluciaj batalantoj kortuŝiĝis precipe de la senlima amo, senlima respekto kaj sen-

lima adoro de la laboristoj kaj kamparanoj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Kiam oni sciigis, ke ili estas farantaj longan marŝon al Pekino, ili arope petis, ke la trupanoj transdonu iliajn salutojn kaj plej karajn donacojn al Prezidanto Maŭ. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Erbaŭ-komunumo de Hami alportis grandajn melonojn, specialan produktaĵon de la loko, kaj laborantoj de Ŝenggintaj-stacio preparis 11 specojn de fritajoj por ke ili kunportu kelkajn al Prezidanto Maŭ. Ĉiuj homoj renkontitaj survoje fojrefoje diris al la junaj batalantoj, ke la lastaj kunportu al Pekino ilian ruĝan koron volantan ĉiam revolucii sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Maljuna laboristo de la Turfan-a Stacio ripetadis al ili la jenan frazon dum adiaŭo al ili: Vidinte Prezidanton Maŭ, diru al li, nia amata, nian bondeziron, ke li vivu longe.

Propaganda Trupo kaj Semilo

La junaj revoluciaj batalantoj gravuras en sian memoron la jenan instruon de Prezidanto Maŭ: "**La Longa Marŝo estas deklario, propaganda trupo kaj semilo.**" Ili decidis bonege lernadi la penson de Maŭ Zedong kaj ĝin propagandi survoje, por ke ĝi enradikiĝu, fruktodonu kaj okupu ĉiun pozicion en la popolamasoj. Ili faris propagandon tie, kien ajn ili atingis. La amasoj ilin laŭdis, ke ili estas veraj ruĝaj soldatetoj de Prezidanto Maŭ, kaj eminentaj propagandistoj de la penso de Maŭ Zedong.

Survoje, ili disdonis grandan kvanton da broŝuroj verkitaĵoj de Prezidanto Maŭ kaj *Vortoj de Prezidanto Maŭ*, surgluigis afiŝojn kun vortoj de Prezidanto



Lernante de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj sin kombinante kun ili, la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj dum sia piedira interkontakto terkulturas kun la komunumanoj.

*Longmarŝa taĉmento
el la Universitato de
Interna Mongolio mo-
viĝas en la granda de-
zerto de Ordos-alt-
ebeno.*



Maŭ sur murojn en loĝejoj de laboristoj, malriĉ-kampanoj kaj malsuperaj mez-kampanoj, instruis al ili kanti kantojn kun vortoj de Prezidanto Maŭ kaj aranĝis kune kun revoluciaj popolamasoj propagandajn kunvenojn por prikanti la penson de Maŭ Zedong. Iu longmarŝa trupo de la Hingiang-a Universitato skribis pli ol mil citaĵojn el verkoj de Prezidanto Maŭ, sur montpasejoj, krutaĵoj kaj muroj sur la vojo.

“Ni komunistoj estas kvazaŭ semoj, kaj la popolo estas kvazaŭ grundo. Ni devas kombiniĝi kun la popolanoj tie, kien ni atingis.” Tiu ĉi instruo de Prezidanto Maŭ firme gravuriĝis en la koro de la trupanoj. En kiom ajn granda malfacilo, ili ĉiam persistas ĉe interligiĝo kaj kombiniĝo kun la popolamasoj. Iutage, kiam longmarŝa trupo el ok junulinoj post 40-kilometra piedirado atingis Ŝanŝan-stacion, jam vesperiĝis kaj ili sentis lacegon kaj dormemon. Kiam ili estis pretaj ekriprozi, ili informiĝis ke okazas en la stacio amasa amuza vesperkunveno. Ili ja ne volis preterlasi la bonan ŝancon por propagando de la penso de Maŭ Zedong. Ili do rapidis al la kunveno, laŭtleĝis tie propagandajn materialojn pri la granda kultura revolucio kaj prezentis programerojn prikantantajn Prezidanton Maŭ.

Imiti la Ekzemplon de la Popola Liberiga Armeo

“Lernu de la Liberiga Armeo” estas granda alvoko de Prezidanto Maŭ al la tuta popolo. La ruĝaj gvardianoj de la longmarŝaj trupoj aparte

emfazis tiun ĉi alvokon en sia deklaro. Kiel normon de sia agado ili skribis en siaj taglibroj kaj la kapo la regularon “**tri ĉefaj reguloj de disciplino kaj ok punktoj de atento**”, kiujn Prezidanto Maŭ persone ellaboris por la Liberiga Armeo. La trupanoj fiksas por si krome “Ses Ne-foriru-ojn”, nome: Ne foriru antaŭ redono de pruntitaj objektoj; ne foriru antaŭ purigo de la korto kaj loĝejo; ne foriru antaŭ ol kompenso de difektita objekto al la posedanto; ne foriru antaŭ ol likvido de ŝuldo; ne foriru antaŭ ol plenigo de akvobarelo per akvo; ne foriru antaŭ ol aŭskulti opiniojn de lokaj popolamasoj. Iuj membroj tondas harojn, skribas leterojn, riparas meblojn, purigas komunajn lokojn kaj loĝejojn por popolamasoj. Ili kaptas ĉiujn okazojn por fari bonojn al la popolamasoj.

En la lokoj trapasitaj de la junaj revoluciaj batalantoj, cirkuladas rakontoj pri ilia disciplinemo en la amasoj, protektado de la popolaj interesoj kaj ŝtataj posedaĵoj. Iu trupano deprenis, ĉe la stacio de la Sala Lago, du najlojn de sur fenestro por ripari vitritan kadron kaj ne faris kompencon. Poste, la trupo speciale diskutis pri tio kaj decidis skribi al la stacio por fari memkritikon kaj informi ĝin, ke la trupo pardonpetos kompencon revenvoje. Fervojistoj en la ĉirkaŭaĵo de Ŝanŝan donacis al iu longmarŝa trupo 23 pomojn. Kvankam la laboristoj firme rifuzis akcepti pagon, la trupanoj tamen iel liveris la pagon al la laboristoj. Unu el la trupanoj kolektis pli ol cent ŝpalajn najlojn kaj ŝraŭbojn survoje, kaj ilin donis al inĝeniera sekcio de la fervojo. La amasoj unuvoĉe nomas ilin: “bonaj posteuloj de la veterana Ruĝa Armeo”.

Ĝang Side, Kiu Tutkore Servis al la Popolo



(1) Ĝang Side aliĝis al la Ruĝa Armeo en 1933.



(2) Ĝang Side konsciis ke li servas kiel soldato por la revolucio, tial li batalis tre kuraĝe kaj sagace. En iu batalo, li sola deprenis de la malamikoj du maŝinpafilojn.



(3) En julio 1940, li ricevis ordonon gvidi sian subplotonon fari lignokarbon en montaro. Li diris al la kamaradoj: "Fari lignokarbon celas garanti la hejtadon por la kamaradoj dum la vintro, ni devas nepre plenumi tiun revolucionan taskon."



(4) La elpreno de preta lignokarbo el la forno estas laboro postulanta grandan streĉadon por batalakiri ĉiun eblan sekundon, dume la temperaturo en la forno estas tre alta. Ĝang Side ĉiam sinjetis al tiu laboro la unua.



(5) La tuta koro de Ĝang Side estis por la kolektivo. Iunokte, ekfalis pluvego, li tuj iris por protekti la fornegojn.




(6) Ĝang Side metis la interesojn de la revolucio en la unua loko kaj ĝiam gardis sian ŝpareman kaj simplan vivmanieron. Li flikis kaj flikis sian eluzitan vatitan jakon por ĝin uzi vintron post vintro.



(7) Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, Ĝang Side kore amas la popolon. Ĉien ajn li alvenis, li balais la korton, alportis akvon, manĝigis la bovon kaj faris aliajn laborojn por la vilaĝanoj.



(8) Iun nokton estis granda pluvo. Ĝang Side ĵus revenis post transporto de leteroj kaj trovis ke alia urĝa letero devas esti tuj transportata. Li ne vekis aliajn kamaradojn kaj mem plenumis la taskon. Por ne malsekigi la leteron, li metis ĝin inter siajn ŝuojn, kiujn li demetis de siaj piedoj. Tiel li ĝustatempe kaj bone plenumis la transporton.



(9) Por la granda idealo de komunismo, Ĝang Side uzis betulan ŝelon kiel paperon kaj faris plumon el kuglingo por obstine klerigi sin kaj aliajn.



(10) En 1944, li estis denove ordonita fari lignokarbon. Malŝelice li oferis sian vivon glorie pro falo de fornego de lignokarbo.

Vortoj de Prezidanto Maŭ

Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamaso,
antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj,
kreitaj por ili kaj utiligataj de ili.

“Sagaca Konkero de la Tigro-monto”

— Bonega opero, kiu forte starigas la penson de Maŭ Zedong

LA revolucia moderna pekina opero *Sagaca Konkero de la Tigro-monto* ludita de la Revolucia Pekinopera Trupo de Ŝanhajo estas bonega opero, kiu forte starigas la penson de Maŭ Zedong. Ĝi vivece respiegulas la bravegan kaj saĝoplenan batalon de nia Popola Liberiga Armeo por ekstermi restantajn banditojn, sukcese kreas heroajn figurojn de batalantoj de la Popola Liberiga Armeo armitaj de la penso de Maŭ Zedong kaj entuziasme prikantas la grandan penson de Prezidanto Maŭ pri popola milito.

La prezentado de tiu ĉi opero rikoltis varmajn laŭdojn de la vastaj revoluciaj popolamasoj.

Iom pri la Intrigo de la Opero

La opero temas pri historia okazaĵo en 1946 dum la Liberiga Milito. Tio okazis en la arboza montaro apud Mudan-rivero, nordorienta Ĉinio.

Tiam la Popola Liberiga Armeo gajnis brilan venkon sur la batalkampo de nordorienta Ĉinio (t. e. la 3 provincoj Liaŭning, Gilin kaj Hejlong-giang). Bando de disbatitaj kuomintangaj armitaj banditoj fuĝis profunde en arboriĉan montaron kaj vane intencis obstine rezisti nian armeon dank' al la oportuna topografia pozicio.

Por firmigi la postfronton de nia armeo, aktive kunagadi kun la kampaj korpusoj de la Popola

Liberiga Armeo kaj grandskale ekstermi reakciajn trupojn de Kuomintango, iu el niaj trupoj komisiis Ŝaŭ Gianbo, la ĉefstabanon de iu regimento, organizi taĉmenton el 36 anoj por plenumi la taskon ekstermi la forfuĝintajn banditojn. Laŭ la instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**fondi fortikan bazlokon en la Nordoriento**”, ili penetris profunde en la neĝan stepon kaj vastajn arbarojn por mobilizi la popolamasojn. Kaj post malfacila kaj zorga organizado dum certa periodo, rapide leviĝis la popolamasoj.

La nesto de la bandita ĉefo Monta Aglo sur la Tigro-monto sidas en tre oportuna loko kun kompleksa sistemo de defendo, tial oni devas ĝin ataki ne nur per armitaj fortoj, sed ankaŭ per saĝo. Pro tio kompartiano Jang Zeĵong, la estro de la rekognoska plotono, alivestis sin en la kaptitan banditon Hu Biaŭ, kaj kun la Interliga Nomlisto trovita ĉe la lasta penetris en la banditan neston sur la Tigro-monto.

Kiam Jang Zijong eniris la Tigrohalon, la Monta Aglo tuj lin atakis per slangaj demandoj kaj lin timigis per preciza pafrompo de pend-lampo. Sed Jang Zijong kun sentimeco de komunisma batalanto flue respondis liajn demandojn tute aplombe, kaj diris al li, ke li alportis la In-

terligan Nomliston kaj per tio akiris unuapaŝan fidon de la Monta Aglo. Kiam tiu ĉi ebris de ĝojo pro baldaŭa akiro de la longe deziregata Nomlisto, Jang Zijong kaŝe mokis la azenajn banditojn: “Tro frue vi ĝojas! La horo de via enmanigo de la Nomlisto estos tempo por via morto.” Jang Zijong gajnis la unuan batalon post sia eniro al la tironesto.

Dum la bankedo aranĝita de la stultaj malamikoj por festi la sukceson de Jang Zijong, tiu ĉi transprenis la tostan pokalon kun preta ideo kaj kantis elegante:

*Nun drinkas mi pro la sukceso
Kaj juras lukti plu sen ĉeso
Ĝis fina venk' kaj historion
Sangskribi en la estonteco.*

Per siaj sagacaj dusencaj vortoj Jang Zijong trompakiris la fidon de la malamikoj. Tiamaniere Jang Zijong kondukis sian laboron.

“Je kokokrio, heliĝas ĉio”. Ŝaŭ Gianbo kun la taĉmento sub sia gvido atakas la banditojn sur la monto, kaj tute ekstermis la banditaron, dank' al kunagado interne kaj ekstere de ĝia nesto.

Impresivaj Heroaj Figuroj

Ruĝa linio de la penso de Prezidanto Maŭ pri la popola milito trakuras la tutan operon *Sagaca Konkero de la Tigro-monto*. Per vivecaj kaj impresivaj artaj figuroj, ĝi klare montras, ke la nutraĵo por la kreskado kaj fonto de energio de la herooj Ŝaŭ Gianbo, la komandanto, Jang Zijong, la estro de la rekognoska plotono, k. a. estas la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. Ili estas veraj herooj venintaj el la popolamasoj, kaj ilia senlima saĝo kaj kuraĝo kaj ĉiu el iliaj sukcesoj senescepte brilas per kolektiva saĝo de la amasoj.

La eminenta karaktero de Jang Zijong en la opero prezentiĝas en tio, ke li neniam sin disigas de la amaso. Aparte elstara li sin prezentas en rekognoskado en civilvestoj, savo de la ĉasista filino Ĉang Baŭ, luktado kontraŭ la banditaro, transsendo de sekreta informo ktp. Kun siaj braveco, sagaco, eltrovemo de rimedoj, decido, alta spirito kaj eminenta

batalarto, li vere estas figuro de respektinda proleta revolucia batalanto.

Jang Zijong plenumas sian taskon sub la helpo de la amasoj kaj kreas sian heroaĵon subtenate de la amaso. Estas la amasoj, kiuj diras al li la aktivadon de la banditoj, montras al li la vojon sur la monto kaj faras bonan preparon por lin subteni. Kaj Jang Zijong bone konscias tion kaj li ĉiam sin apogas sur la amasoj, arde ilin amas kaj ĉiam ilin prizorgas. En la sceno “Vizito al Suferantoj Profunde en Montaro”, aŭdinte la akuzon de la ĉasisto Ĉang kaj lia filino pri la krimagoj de la Monta Aglo kaj la malnova socio, li kantis indigne:

*Pro ĉiu vort' kun sang' kaj larmo
Ekbrulas en mi malamflamo.
Ja ĉiu subpremat' de l' mondo
Estas kreditor' de sango.
Ni venĝu nin, jam kontkalkulu
Kaj sang-repagon ni postulu.*

Tio montras, ke li havas sangokarne intiman klasan sentimenton al la laborantaj popolanoj. En la sceno “Suriro de Monto por Mortigo de Tigro”, Jang Zijong esprimis sian altan aspiron kantante kun vizaĝo al la nuboskrapaj montoj:

*Por ke la ruĝa flago flirtu tra la mondo,
Mi jetos min al fajromaro kaj glavmonto.
Mi deziregas, ke l' neĝflokaj iĝu varma fonto,
Ke venu jam printemp' de tute nova mondo.*

Tion aŭskultante, la spektantoj ne povas ne esti kortuŝitaj kaj admiri la ĉiele altan heroismon,



Jang Zijong kaptis la obstinan banditĉefon la Monta Aglo.

puran lojalecon kaj altan idealon de Jang Zijong!

*Kaj saĝon kaj kuraĝon mi ricevis de l' Partio,
Mil malfaciloj kaj danĝeroj por mi 'stas nenio.*

Tute sentime Jang Zijong marŝas grandpaŝe al la vasta neĝejo en nebulo.

Post enpenetro en la neston de la banditoj, li fariĝis ankoraŭ pli kuraĝa, konsiderante ke vasta popolamaso lin subtenas. Li kantas (*flanken*) kun levita kapo kaj elstarigita brusto en la Tigrohalo:

*Kvankam mi estas sola en la tigroneŝto nune,
Mi sentas kvazaŭ dek mil fratoj staras kun mi kune
Spite al la feroce flama de la Monta Aglo,
Por la popolo mi forte batos la demonon pune.*

Per tio, la spektantoj povas kompreni profunde, ke kvankam Jang Zijong estas sola en la bandita nesto, tamen la penso de Maŭ Zedong ĉiam lin gvidas en batalo.

Same kiel la heroa figuro de Jang Zijong, ankaŭ tiu de Ŝaŭ Gianbo estas kreita sukcesplene. Kiel komandanto, li havas profundan komprenon pri la primilita penso kaj amasa linio de Prezidanto Maŭ. Ĝuste pro gvido de la granda penso de Maŭ Zedong, li povas ĝuste koni kaj analizi la situacion kaj prijuĝi la staton de la malamiko, korekte eduki la batalantojn kaj funkciigi la kadrojn kaj ĝuste praktiki la principon sin apogi sur la amasoj, ilin mobilizi per la penso de Prezidanto Maŭ pri la popola milito kaj direkti elaste laŭ la bezonoj la taĉmenton en la batalo por ekstermi la banditojn. La spektantoj sentas profunde, ke la taĉmento el 36 personoj sub lia gvido estas ĉiamvenka kolektivo, miniaturigo de nia granda popola armeo. "Sub generalo eminenta ne estas hom' nekompetenta", — el la senlimaj saĝo kaj kuraĝo de Jang Zijong oni povas vidi fortan influon de la spirito de Ŝaŭ Gianbo.

Kvankam Ŝaŭ Gianbo aperis ne multajn fojojn sur la scenejo, la opero tamen plene montris la batalan rolon de li luditan. El la brava kaj senŝanceliĝa batalado de Jang Zijong, oni povas senti ankaŭ la forton de Ŝaŭ Gianbo kaj la fortan gvidan rolon de la Komunista Partio, kiun li reprezentas.

Samtempe kun la koncentra priskribo de la heroaj figuroj de Jang Zijong kaj Ŝaŭ Gianbo, la opero ankaŭ emfaze priskribis la heroajn figurojn de la taĉmento kaj la revolucia amaso de Giapiĝoŭ. Ankaŭ la priskribo pri la fervojisto Li Jongki kaj detala priskribo pri la maljuna ĉasisto kaj lia filino reliefigas la rolon luditan de la popolamasoj

en revolucia milito, tiel ke la opero plenas je revolucia etoso kaj donas fortan impreson al la spektantaro.

Tute Nova Pekinopera Arto

Konforme al la enhavo de la opero *Sagaca Konkero de la Tigro-monto*, kiu propagandas la penson pri la nevenkebla popola milito kaj prikantas laboristajn, kamparanajn kaj soldatajn heroojn armitajn per la granda penso de Maŭ Zedong, estas necese rompi la rutinajn regulojn de la pekinopera arto kaj krei kompletan da tute novaj esprimformoj.

La kamaradoj de la Revolucia Pekinopera Trupo de Ŝanhajo streĉe penadis kaj akiris ĝojindan sukceson. La kantoj, recitativoj, mimikado, bataldancoj, muziko, scenejaj instrumentoj kaj dekoraĵoj, ĉio senescepte estas nove kreita por ekzakte prezenti la revolucian politikan enhavon. Por bone esprimi la bravecon kaj altan aspiron de la popolaj batalantoj, ili kreis serion da novaj melodioj, per kiuj ĝuste montriĝas la imponeco de la herooj. Kaj laŭ la bezono taŭge respeguli la batalan vivon, ili kreis ankaŭ dancojn de rajdado, skiado, luktado, transsalto k. s., kiuj konformas al la vero de la vivo kaj arto. La opero tamen konservas en si fortan guston de la pekinoperaj karakterizaĵoj.

Estas ankoraŭ pli ĝojinde, ke ili transformis, laŭ la bezono de la enhavo, la tradician recitativon de la malnova pekinopero en ordinaran parolon laŭ la ĝenerala parollingvo, kiu baziĝas sur la pekina dialekto, kaj la tekstoj de ĝiaj kantoj estas facile kompreneblaj por la amasoj. Krome, ili adaptis je ĝustaj lokoj citaĵojn rektajn aŭ nerektajn el verkoj de Prezidanto Maŭ kaj per tio multe profundigis la penson de la temo kaj donis klaran politikan penson kaj artan efekton al la verko.

La sukcesa prezentado de *Sagaca Konkero de la Tigro-monto* estas venko de la penso de Maŭ Zedong kaj frukto de la granda proleta kultura revolucio. La kreado kaj prezentado de la opero fare de la kamaradoj en la Revolucia Pekinopera Trupo de Ŝanhajo karakteriziĝas per elstarigo de la penso de Maŭ Zedong, kreiva studo kaj kreiva aplikado de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj pint-kontraŭpinta batalado inter la proleta kaj burĝa linioj de literaturo kaj arto. La faktoj pruvas: oni povas forte starigi proletajn kaj socialismajn revoluciajn literaturon kaj arton, nur se oni forte detruas tiujn de la burĝaro kaj feŭda klaso; kaj la proletaj literaturo kaj arto povas plie prosperiĝi, nur se oni faligas la reakciajn burĝajn "aŭtoritatojn" de literaturo kaj arto.

HIANGJANG:

Amikinoj el Usono (dekstre) kaj el Francio (maldekstre), laborantaj en Ĉinio, draŝas surkampe kune kun komunumano.



Kun Plena Revolucia

Pasio Fremdlandaj

Specialistoj Labore Hardas Sin en Kamparo

LA ruĝa suno leviĝas, kaj la aŭroro plenigas la tutan ĉielon.

Renkonte al la leviĝanta suno, 58 fremdlandaj amikoj kun malsamaj naciecoj kaj malsamaj haŭtkoloroj venas al kampoj de ĉirkaŭurbaj polkomunumoj de Pekino, plenvoĉe kantante *Ruĝas la oriento*, por komenci sian novan lecionon pri kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ.

En la momento, ekregas la kampojn varma atmosfero de vigla laborado. Samkiel la komunumanoj, la fremdlandaj amikoj supren faldis siajn manikojn kaj pantolonajn tubojn, netimante malpurajn kaj laciĝon, ili aŭ fosas teron per ŝoveliloj aŭ kune transportas brasikojn. Kiam sur la manoj aperas vezikoj, aŭ sangas la vundoj, ili surgluas pecon da plastro, sed ne konsentas iom paŭzi. . . .

Streĉe kaj gaje laborante, ili ĝoje kantas *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto*.

"Novaj Membroj" de la Komunumo

Tiuj amikoj venintaj el 20 landoj estas parto de fremdlandaj specialistoj, kiuj venis al Pekino por helpi la konstruadon de nia lando. En la alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio de nia lando, kun plena revolucia pasio, ili firme decidis sekvi la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kunligiĝi kun la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj kaj memvole iris

en kamparon por sin hardi en laborado. Ili venis al la tri popolaj komunumoj Lukoŭkiaŭ, Huangtugang kaj Nanjuan, dise loĝis en la hejmoj de komunumanoj kaj laboris kune kun ili dek tagojn.

Tute kiel ordinaraj komunumanoj, ili tuj sin okupis pri diversaj laboroj post la alveno: Rikoltadon de brasikoj, napoj, fosadon de legomaj konservejoj kaj starigon de pajlaj ventosirmiloj, ĉiun laboron ili faris.

Multaj el ili partoprenis tian laboron la unuan fojon dum sia vivo. Sed, rigardante la komunumanojn kiel siajn instruantojn kaj timante nek penadon nek laciĝon, ili ĉie prenis la komunumanojn kiel siajn modelojn. En la unua tago, la kadroj kaj komunumanoj de produktaj brigadoj timis, ke ili ne povas elteni tian laboradon, kaj aranĝis por ili ekstran ripoztempon. Kiam la specialistoj rimarkis tiun apartan aranĝon, ili neniel volis ripozi. Ili diris: "Ni 'novaj komunumanoj' devas esti traktataj same kiel la 'malnovaj' kaj absolute ne devas ĝui apartan prizorgon."

Fremdlandaj amikoj, kiuj sin okupas pri portado de tero kaj kies kapo jam plene ŝvitas, kuretas portante korbon plenan de tero. Komunumanoj mansignas al ili por ke ili iom ripozu. Iu fremdlanda amiko elpoŝigas la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ* kaj voĉlegas: "Disvolu la stilon de kuraĝo en batalo, sentimo pri oferoj kaj laciĝo

kaj kontinua batalado (t. e. plenumi sinsekvajn batalojn sen ripozo en mallonga tempo).” Finleginte tion li forrapidas portante teron kun sia kunulo.

La ŝultro de kolombia amiko Sergio Cabrera ŝvelas pro portado, iu proponas sin por anstataŭi lin, sed li neniel volas konsenti. Li diras: “Ju pli mi laciĝas des pli mi devas labori, ju pli ŝveliĝas al mi la ŝultro des pli mi devas hardi min. Kiam mi pensas ke, por revolucii kune kun mia popolo en la estonteco, mi bezonas formi al mi spiriton sentiman je penado, mi ekhavas energion.”

Kvar specialistinoj loĝis en la hejmo de la komunumano Jin Hongki. Lia patrino ĉiam preparis bongustajn manĝaĵojn por la fremdlandaj amikinoj. La usona amikino Eleanor Chaidin foje-refoje diris: “Ni venas al la kamparo por hardi nin kaj reformi nian penson. Ni ne bezonas bonan manĝaĵon. Onklino, vian bonvolon ni danke akceptis, sed ni ne povas ĝui apartan traktadon.” Ĉinaj kamaradoj timis, ke la fremdlandaj amikoj suferos malvarmon, kaj liveris al ili pli da matracoj kaj kovriloj, kiujn multaj amikoj rifuzis uzi kaj petis ke oni traktu ilin kiel ĉinajn kadrojn, kiel “revoluciajn kamaradojn” kiuj povas elteni ventojn kaj pluvojn.

Ni Ŝatas Legi la “Tri Malnovajn Artikolojn”

Antaŭ la iro al kamparo multaj fremdlandaj amikoj jam legis la tri brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ, *Servu al la Popolo*, *Rememore al Norman Bethune*, *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. Ili ĉiam kunportis la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ* kiam ili iris al kampoj. Iuj amikoj aparte starigis tabulon kun vortoj de Prezidanto Maŭ ĉe siaj laborlokoj, por ke ili povu el ĝi eltiri senliman forton.

Tiel ĉe kampoj dum laborpaŭzoj, kiel en la loĝejo post la laboro, ili ofte studis vortojn de Prezidanto Maŭ kune kun komunumanoj.

La sekvinta vespero post ilia alveno estis regula lernotempo de la komunumanoj. Post la

vespermanĝo, kelkaj fremdlandaj amikoj kaj komunumanoj studis kune *Servu al la Popolo*, en la hejmo de iu komunumano. Post la paroloj de du komunumanoj en la studa rondo, iu fremdlandaj amiko, kiu sidis sur terlito, ankaŭ eldiris sian komprenon post la studo: “Homo devas havi ĝustan celon de vivo kaj ne vivi nur por si mem, sed devas vivi por sia tuta nacio; ne nur por sia nacio sole sed devas vivi por la liberiĝo de la tutmonda popolo. Mi agos en la praktiko nepre laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, prenante Ĝang Side kiel mian modelon.”

Foje dum studo iuj amikoj, preparolante sian komprenon, diris: “Kvankam ni legis multajn artikolojn de Prezidanto Maŭ, sed nun ni ekkomprenas la veron, ke antaŭ ĉio oni devas bone studi la ‘tri malnovajn artikolojn’, se ili volas bone posedi la penson de Maŭ Zedong. Nur komencante per reformo de sia mondkoncepto, oni povas vere akiri la penson de Maŭ Zedong.”

En la komuna studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ kune kun la komunumanoj, multaj amikoj plifirmigis sian kredon al la penso de Maŭ Zedong. Ili diris: “Hodiaŭ ni pli kredas ol en la pasinteco, ke la granda penso de Maŭ Zedong estas lumturo, kiu brilas super la monda revolucio. Sub ĝia brilo la popoloj subpremataj kaj ekspluatataj de la imperiismo kaj tiuj trompitaĵoj de la moderna reviziismo, kun la gvidantaro de KPSU kiel sia centro, nepre akiros ĝisfundan liberiĝon.” La usona amiko Israel Epstein diris: “En tiu ĉi malgranda vilaĝo ni vidas ke la penso de Maŭ Zedong jam penetriĝis en la korojn de homoj. La homoj, kiuj armiĝis per la penso de Maŭ Zedong, ja estas nevenkeblaj. Ni ankaŭ vidas ke neniu forto povas disfali la proletan potencon de Ĉinio, tio havas tre tre grandan signifon por la monda revolucio”.

Neniam Forgesu la Suferojn de la Klaso

Ne komprenante subpremon kaj ekspluaton, oni ne povas kompreni revolucion; ne komprenante la amaron kaj feliĉon, la malamon kaj



Amikoj el Usono kaj Novzelando laboras kun komunumanoj.

amon de la laboranta popolo, oni ne povas distingi kiu estas nia malamiko kaj kiu estas nia amiko. Por koni kaj akiri tiun revolucion veron, multaj fremdlandaj amikoj foje-refoje vizitas tiucele malriĉajn kamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, kaj petas ilin rakonti la mizerajn historiojn de siaj familioj kaj de la vilaĝo, rakonti la kontrastojn inter la malnova socio kaj la nova.

Aŭdinte en iu produkta brigado la familian historion de malnova malriĉa kamparano onklo Ĝaŭ, la fremdlandaj amikoj sen antaŭa interkonsento venis al lia hejmo. Kiam ili eniris en la korton, eliris junulo kaj junulino renkonte al la gastoj. Montrante la junulon, onklo Ĝaŭ diris: "Li estas mia filo, kiu preskaŭ mortis pro malsato antaŭ la Liberiĝo." Montrante la junulinon li daŭrigis: "Ŝi estas mia bofilino." La gastoj varme gratulis ke ili emancipiĝis kaj akiris feliĉon sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Partio. Pakistana amiko Faiz Ahmad prenis la manon de onklo Ĝaŭ kaj diris: "La ŝanĝiĝo de via familio estas vere granda! Sen politika liberiĝo, tia ŝanĝiĝo estas nebla. Tio okazis dank' al la ĝusta gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio. Mi kredas, ke viaj idoj certe memoros ĉiam la pasintan amaron kaj la hodiaŭan feliĉon."

Iun vesperon post la manĝo, malaja amikino Sarada Sarma kaj aŭstra amiko Hermine Czerny vizitis malriĉan kamparaninon Li Ven-hiu, kiu servis kiel servistino al kapitalisto iam antaŭ la Liberiĝo. Informiĝinte pri ŝia granda ŝanĝiĝo okazinta post la Liberiĝo, Sarada Sarma emociite diris: "Prezidanto Maŭ ne nur portis al la ĉina popolo feliĉon, sed ankaŭ montris la brilan estontecon al la laboristoj kaj kamparanoj de la tuta mondo. Prezidanto Maŭ estas la plej granda revolucia instruanto de la mondo kaj plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko."

Aŭdinte la rakonton pri la pasintaj amaraĵoj kaj komparon kun la hodiaŭa feliĉo de la malnovaj malriĉaj kamparanoj, kaj vidante la du malsamajn sortojn de la ĉinaj kamparanoj en

la malnova kaj nova socioj, iuj amikoj ekpensis pri la multaj suferantaj popoloj de sia patrolando kaj de la tuta mondo. Kolombia amikino Elvia Poseda kortuŝite diris: "Ĉi tie, kiam mi propraokule vidas, ke la ĉina kamparanaro jam forskuis la amaraĵojn kaj vivas feliĉe, mi ekpensas ke la popolo kaj la kamparanaro de nia lando vivas ankoraŭ en tre amaraj kondiĉoj, kaj eksentas kordoloron. Sed, havante la grandan penson de Maŭ Zedong kaj la revolucion modelon de la ĉina popolo, la liberiga batalo de nia popolo kontraŭ imperiismo kaj enlanda reakcia regado certe triumfos."

Hele brilas la lampoj de la domo de malriĉa kamparanino Bi Joŭĝen. La fremdlandaj amikinoj denove kolektiĝis tie por babili kun la familianoj de la gastigantino. Franca amikino Anne Paron kaj svisa amikino Lucette Grieshaber prezentis la mizeran vivon de la laboristoj kaj kamparanoj de Francio kaj Svislando. Prenante la manojn de Anne kaj Lucette, Bi Joŭĝen diris: "Sub la ĉielo ĉiuj laboruloj estas similaj, sen regpotenco ili estas ĉie subpremataj."

Tenu la Mondan Revolucion en la Koron

En la komuna laborado dum dek tagoj, la fremdlandaj amikoj kaj komunumanoj vivis en unu granda revolucia familio kvazaŭ samfamilianoj. Ĉiufoje post la laboro, komunumanoj ĉiam zorge demandis ilian sanon kaj portis al ili varman akvon kaj te-infuzajon. Ilia plej intima lingvo estis komuna esprimo de senlima amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ili reciproke esprimis ke ili ĉiam faros revolucion sekvante Prezidanton Maŭ, por ke la tuta mondo akiru ĝisfundan liberiĝon.

Dum la tagoj de kunvivado kun la fremdlandaj amikoj, la komunumanoj ofte diris al ili: "Nia vivo pliboniĝas tagon post tago, sed ni absolute ne forgesos la pasintecon kaj la popolojn, kiuj ankoraŭ ne liberiĝis en la mondo. Ni nepre aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ, meti la patrolandon en la koron kaj ĉirkaŭpreni la



Finiĝis la taga laboro, bolivia kaj kolombia amikoj studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun la komunumanoj.

mondon per la rigardo, fari revolucion kaj batalakiri la liberiĝon kune kun la monda popolo.”

Iu novzelanda amiko foje renkontis survoje maljunulon pli ol 80-jaran, ili interparolis tre intime. La maljunulo prenis lin por usonano kaj ridetante diris al li: “Ni bonvenigas vin! La usonaj invadantoj estas niaj malamikoj, sed ĝia popolo estas nia amiko.” Aŭdinte tion tiu amiko tre emociiĝis kaj diris: “Tiel grandaĝa, tiu ĉina kamparano povas distingi tiel klare la popolanojn disde la regantoj de imperiismaj landoj. Tio estas por mi vere tre bona internaciisma leciono.”

Same kiel tiu novzelanda amiko, multaj amikoj propraokule vidis en tiuj ordinaraj kamparanoj noblan proletan internaciisman spiriton de la ĉina popolo, kaj persone traspertis, ke la ĉina popolo, armita per la penso de Maŭ Zedong, estas potenca apogilo por la subpremataj popoloj de la tuta mondo en la revolucia batalo.

Antaŭenmarŝi laŭ la Granda Vojo de la Penso de Maŭ Zedong

La neforgeseblaj dek tagoj jam pasis, la fremdlandaj amikoj adiaŭas la fratojn-kamparanojn kun granda bedaŭro. La viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj junuloj akompanas la amikojn, distancon post distanco, ili ripetade invitas la geamikojn ree veni ĉi tien kiel gastoj tuj trovante tempon.

Kun profunda amikeco, fremdlandaj amikoj Seddik Zoulim kaj Serge Pairoux plantis pomarbojn antaŭ la domo de komunumano, ĉe kiu ili loĝis dum la dek tagoj kaj nomis ĝin “revolucia amikeco”.

La fremdlandaj amikoj jam forlasis la kamparon, sed la vivo de la dek tagoj ankoraŭ tajdas en iliaj cerboj. Ili diris: “Ni por ĉiam ne forgesos la memorindajn dek tagojn. En la dek tagoj ni lernis pli multe ol en la pasintaj dek jaroj. Dum tiu tempo ni lernis la elstarajn kvalitojn de la komunumanoj, klasbatalon kaj produktan batalon. Unuvorte, ni lernis la penson de Maŭ Zedong, tag-nokte sopiratan.”

Fremdlanda amiko Seddik Zoulim diris: “Prezidanto Maŭ instruis al ni: ‘La popolo, nur la popolo estas movforto de kreado de la monda historio.’ ‘La amaso estas vera heroo, kaj ni mem ofte estas infanece ridinda, sen kompreno pri tio oni ne povas akiri eĉ elementan scion.’ Malfeliĉe mi ricevis en la pasinteco burĝan edukadon, kaj mia lernita teorio estas malplena kaj mia praktiko estas blinda. Nur laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, tutanime iri en la revolucion amason kaj lerni de laboristoj kaj kamparanoj, ni povas esti saĝaj en juĝo kaj klaraj en vido.”

Belga amikino Dethiers Monique gaje rakontis sian impreson pri la labora hardado en la kamparo: “Ĉiu revoluciulo ne devas forlasi eĉ momente la amason, des pli ne la amasojn de laboristoj kaj kamparanoj, kaj la nuna stato de Sovetunio estas serioza leciono. Ni volas revolucion, sed ne reviziismon. Ni devas ofte iri inter la laborantaj amasojn, en la praktikon de la klasbatalo kaj produkta batalo, nur tiamaniere, ni povas esti imunaj kontraŭ reviziismo.”

Juna itala amiko Ivandro Bertuccioli diris: “Prezidanto Maŭ diris, ke por scii, ĉu iu junulo estas revolucia aŭ ne, oni juĝas laŭ tio, ĉu li volas kaj praktikas la kunligiĝon kun la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj. La nuna praktiko havigis al mi pli profundan komprenon pri la instruo de Prezidanto Maŭ. Junulo povas vere kompreni la laborantan popolon, pli bone studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj reformi sian mondkoncepton, nur kiam li iras inter la amasojn, fariĝas unu el ili, kaj kunligiĝas kun ili.”

Multaj fremdlandaj amikoj opinias, ke ĉifoje ili laboris dek tagojn en la kamparo, tio estas nur komenco de kunligiĝo kun la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj. Ili esprimis ke ili poste plimulte kontaktiĝos kun la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj, kaj lernos de ili. Ili emociite diris: “Prezidanto Maŭ pavimis por ni la larĝan revolucionan vojon, laŭ kiu ni ĉiam firme marŝos antaŭen.”



Fremdlandaj amikoj laboras kaj ĝuas abundan rikolton kune kun komunumanoj.



Alte tenante la portreton de Prezidanto Maŭ kaj liajn vortojn, japanaj popolanoj manifestacias grandamase en la urbo Iwakuni, kie troviĝas usona militbazo.

Ruliĝas Antaŭen la Revolucia Fluego de Monda Popolo

LA nuna situacio de la revolucia batalo de la monda popolo estas senprecedence bona. La revolucia tajdo impete leviĝas kaj ruliĝas antaŭen. La batalo akiris unu venkon post alia.

Revolucia Ŝtormo de Azio Estas Nehaltigebla

Azio estas la grava batalejo, sur kiu okazas granda lukto inter la monda popolo unufanke

kaj la usona imperiismo kaj ĝiaj komplikoj aliflanke. En Vjetnamio — la fokuso de batalo de la monda popolo kontraŭ la usona imperiismo — kaŭze de la justa nacisava batalo de la heroo vjetnama popolo, la usona imperiismo jam troviĝas en senelira stato. Agoniante, la usona imperiismo freneze disvastigas la militon kaj faras grandpaŝan eskaladon en la milito, sed ĝi povas neniom returni sian malvenkan staton. Sur la batalkampo, la

aktiveco ĉiam restas en la mano de la vjetnamaj armeo kaj popolo. Tiu milito ne nur ĉiam pli multnombre konsumas la “elitajn trupojn” de diversaj armespecoj de Usono kaj malkovras la morte malfortan punkton de la usona imperiismo, ke ĝia militlinio estas tro longa, homforto ne sufiĉa, postfronto tro malproksima, provizado malfacila ktp., sed ankaŭ estas jam malordigita la plano de ĝia tutgloba strategio.

La nacisava batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona imperiismo tre forte kuraĝigas kaj subtenas la popolojn de Azio kaj aliaj landoj de la mondo en iliaj revoluciaj bataloj.

En Laoso, Tajlando, Malajo kaj Filipinoj, la armitaj bataloj de la popolo senĉese disvolviĝas. En Laoso, la Laosa Popola Liberiga Armeo jam frakasis la strategian intrigon de la usona imperiis-

mo, kiu intencas ataki kaj okupi la mezan kaj malsupran Laoson por kunigi la sudan parton de Laoso kun la usona batalkampo en suda Vjetnamio. Sole de januaro ĝis novembro en la lasta jaro, ili jam brile sukcesis ekstermi ĉirkaŭ dek mil malamikojn, faligi kaj vundi pli ol 150 malamikajn aeroplanojn. Tio donis fortegan baton al la usona imperiismo kaj ĝia lakeo, la dekstra militista kliko de Laoso.

Tajlando estas unu el la gravaj militaj bazoj de la usona imperiismo por agresi Vjetnamion kaj la tutan sud-orientan Azion. La agresa armeo de la usona imperiismo en Tajlando jam plimultiĝis ĝis pli ol 36,000 anoj, kaj kun la tajlanda reakciularo ĝi intensigis “ĉirkaŭ-ekstermadon” kontraŭ la armitaj fortoj de la popolo. Sed, kontinue plifortiĝas la armitaj fortoj de la tajlanda popolo

dum la batalo kontraŭ “ĉirkaŭ-ekstermado”, kaj ĝia agadsfero jam etendiĝas de la nord-orienta parto al la suda parto. Tio multe timigis la usonan imperiismon kaj la tajlandan reakciularon. La okcidentaj informagentejoj jam timkriis ke Tajlando fariĝos “dua suda Vjetnamio”.

La furioza atako de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kontraŭ la azia popolo, fortege akcelis la vekigon de la lasta. La vastaj popolamasoj de Kamboĝo, Filipinoj, Hindio kaj aliaj landoj sinsekve sin ĵetis en ardantan batalon kontraŭ la usona imperiismo. La indigna krio “For la usonajn agresantojn!” disvastiĝis en ĉiuj grandaj urboj de tiuj landoj.

En Indonezio, kvankam la dekstra militista kliko freneze buĉis centmilojn da indonezia popolo, tamen, la popolo ne estas komplete ekstermebla nek timigebla. Ili ĉiam persistas ĉe batalo kontraŭ tiu ĉi faŝisma reĝimo, kaj komencis oponi kontraŭ la armita kontraŭ-revolucio per armita revolucio.

Kiel grava signo de nova vekigo de la azia popolo servas la fakto, ke la vasta japana popolo firme leviĝis kontraŭ la agresado

Firmtenante la pafilon en siaj manoj heroo batalanto de la popola liberiga armeo de Laoso ĉiam pretas puni severe la malamikon alvenontan.



de la usona imperiismo kaj kondukas efikan bataladon. Diversaj cirkonstancoj montras, ke la fortoj de la japana popolo por sia nacia sendependiĝo senĉese kolektiĝas kaj plifortiĝas.

Nova Vekiĝo de la Afrika Popolo

Kun la vasta disvastiĝo de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong en afrika kontinento, pli profunden disvolviĝas en ĝi la naciliberigaj bataloj. La patriotaj armitaj fortoj de Kongolando (L.) en la centro de Afriko, persiste batalas daŭre kontraŭ la usona kaj belga imperiismo kaj ilia pupa kliko en tiu lando. En la vasta kamparo la patriotaj fortoj faras gerilan militon, senĉese disvolvas kaj fortigas siajn fortojn. En Angolo, najbara al Kongolando (L.), "portugala" Gvineo de okcidenta Afriko kaj Mozambiko de orienta Afriko, la popola gerila milito ankaŭ disvolviĝas ĉiam antaŭen. La patriotoj en la norda parto de Angolo, kiuj persistas je armita batalo jam de pli ol kvin jaroj, disvastigis lastjare la bataladon al Moksiko-distrikto en sud-orienta parto. En "portugala" Gvineo la popolaj liberigaj fortoj jam kontrolis ĉirkaŭ duonon da teritorio de la lando nuntempe. La popoloj de la Ekvatora Gvineo en okcidenta Afriko kaj de Zimbabve (Suda Rodezio), ankaŭ ekprenis armilojn unu post la alia, kaj aperis gerila aktivado de revoluciaj armitaj fortoj.

Por savi sin el la sorto de kompleta pereado en Afriko, imperiismo kaj koloniismo, kun Usono kiel sia ĉefo, reĝisoris serion da militaj renversaj agadoj kontraŭ afrikaj landoj kiuj jam akiris sendependecon. Sed imperiismo kaj koloniismo ĉiam "levas ŝtonon kaj frapas per ĝi siajn proprajn piedojn". En la lasta jaro, la reakcia milita ŝtatrenverso fare de la usona imperiismo en Ganao vekis ĉe la afrikaj popoloj fortan kontraŭstaron, kaj tiuj levis grandskalan indignan tajdon kontraŭrenversan kaj gajnis grandajn venkojn, inkluzive la jenajn: la uganda popolo frakasis la intrigon de la usona imperiismo por renversi la ugandan registaron, la tanzania registaro dufoje kontraŭatakis la intrigon de subfosaj agadoj de la usona kaj angla imperiismoj; sinapogante al la popolo, la kongolanda (B.) registaro dufoje venkis la renversajn intrigojn de la imperiismo.

Latinameriko Suriris Novan Stadion de Armita Batalo

En Latinameriko, kiun Usono arogante nomas sia "posta korto", la flamoj de popola revolucio fariĝas ĉiam pli ardaj.



La armeo kaj popolo en la Nordo de Vjetnamio decideme frakasos novan militan intrigon de la usona imperiismo.

En la bonega situacio de la revoluciaj bataloj de diversaj landoj de la mondo, la latinamerika popolo akiris novan progreson en sia batalado kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, kaj la regado de la usona imperiismo en tiu regiono fariĝas ĉiam pli ŝanceliĝema.

Dum aŭgusto kaj septembro de la lasta jaro, la dekelke da dekmiloj da studentoj de la tuta Brazilo heroe kaj persiste faris kontraŭusonon kaj kontraŭdiktaturan batalon dum pli ol unu monato. En marto de la lasta jaro, laboristoj, kamparanoj, lernantoj, oficistoj, dommastrinoj kaj aliaj rondoj de Ekvadoro, levis indignan tajdon de batalo kontraŭ la prousona diktatura reĝimo kaj faligis la militan diktaturan reĝimon, estratan de la usona lakeo Jijon. En Argentino, post sia sursceniĝo, la prousona militisto Juan Garlos Ongania tuj renkontis oponon de dekmiloj da studentoj kaj centmiloj da laboristoj. En 1966, por akiri teron kaj vivrajton, la kamparanoj kaj agrikulturaj laboristoj de Brazilo, Kolombio, Ekvadoro, Peruo, Argentino, Dominiko kaj aliaj landoj senĉese faris batalojn de terdepreno, de marŝado kontraŭ malsato kaj de striko. En la nordorienta parto de Brazilo, kie la kamparanoj dronis en pezaj suferoj, pli granda batalŝtormo estas en kovado.

En Kolombio, Venezuelo, Gvatemalo, Peruo kaj Nikaragvo, la gerilaj fortoj en montaj regionoj kaj kamparoj, sub la ripetadaj "ĉirkaŭ-ekstermadoj" de la malamiko, ne nur ne malfortiĝis, sed ankaŭ pli disvolviĝis kaj pli fortiĝis.

Grandan signifon havas tio, ke iuj progresintaj revoluciuloj komencis akcepti la grandan teorion de Prezidanto Maŭ pri popola milito. La gerilaj taĉmentoj jam komencis priatenti mobilizadon de kamparanoj kaj ekkomprenis, ke la ĉefa batal-kampo de popola milito estas en kamparo, per kiu oni ĉirkaŭas la urbojn. Kaj samtempe, ili pli atentis pri la laboro de revolucia unuecfronto, kaj unuigas la nacian burĝaron por ke ĝi partoprenu tiun ĉi fronton sur la bazo de alianco de la laboristoj kaj kamparanoj.

En la lasta jaro, la revoluciaj fortoj kaj novtipaj marksism-leninismaj partioj kaj organizoj jam stariĝis en pli da landoj en Latinameriko. Tio havas profundan signifon en la procezo de profunda disvolviĝo de la nacia demokratia movado en tiu regiono, kaj ĝi certe malfermos vojon al brila estonteco.


Krizoj Minacas la Usonan Imperiismon Interne kaj Ekstere

Por transŝarĝi malfacilojn al aliaj kaj savi sin el embaraso kaj senelirejo en internaj kaj eksteraj aferoj, la reganta kliko de la usona imperiismo lanĉis furiozajn atakojn kontraŭ la laboranta popolo de sia lando. Kaj tio ne povis ne pliakriigi la usonajn klasajn kontraŭdirojn kaj batalojn. En Usono, la grandskala popola movado kontraŭ

la agresa milito en Vjetnamio disvolviĝas daŭre; kaj la batalo de 20 milionoj da nigruloj kontraŭ la rasdiferencigo kaj por fundamentaj homrajtoj ĉiam pli rapide progresas kaj ekiris sur la vojo de batalo per perforta sindefendo kontraŭ perforta subpremado de la reganta kliko. En la tri someraj monatoj de 1966, eksplodis grandskalaj sindefendaj, perfortaj bataloj de la nigruloj en 38 gravaj urboj en la suda kaj norda partoj de Usono. Kaj ankaŭ senĉese okazas strikoj de usonaj laboristoj. La popola movado kontraŭ la agresa milito en Vjetnamio kaj la movadoj de nigruloj kaj laboristoj iom post iom kunfluas en unu torentegon, kiu forte sturmas la bazon de la regado de la Wall-strataj milionuloj.

Ĉiam pli leviĝas la kontraŭusona movado de la popolo kaj la laboristaj bataloj en la landoj de okcidenta Eŭropo, Kanado, Aŭstralio kaj Novzelando. En tiuj landoj, ŝvele progresas la amasaj movadoj kontraŭ la usona agreso en Vjetnamio, unuvoĉe kondamnantaj la komunan malamikon de la monda popolo, la usonan imperiismon, kiu faris senhomecajn krimegojn en Vjetnamio.

Ĉio ĉi tio pruvis kaj plue pravas la akra videcon de la aserto de Prezidanto Maŭ: "Nun ni troviĝas en nova granda epoko de la monda revolucio. La revolucia ŝtormo de Azio, Afriko kaj Latinameriko certe donos decidan frakasan baton al la tuta malnova mondo." "La proletoj kaj la laborantaj popoloj de Eŭropo, Norda Ameriko kaj Oceanio troviĝas en nova vekigo. La usona imperiismo kaj ĉiuj aliaj malutilaj insektoj jam preparis por si tombofosantojn, kaj la tago de ilia entombigo ne estos tro malproksima."



En Nov-delhio, Hindio, eksplodis granda kontraŭ-registara manifestacio. La manifestacia amaso heroe luktas kontraŭ la reakciaj policanoj ekster la hindia parlamento.



Spite de la kruela, faŝisma subpremo kaj la sanga regado fare de la usona imperiismo kontraŭ la sud-korea popolo, aperadas de tempo al tempo, en stratoj de Seulo flugfolioj kontraŭ la agresado de la usona imperiismo.



Miloj da gestudentoj en la Universitato de Kalifornio, Usono, kun indigno protestas kontraŭ la Johnson-registaro, kiu forlogis junajn studentojn fariĝi kanon-furaĝo de ĝia agresmilito en Vjetnamio.

KURANTAJ AFEROJ

En Konstruado

150-TUNA PLATA DEPENDA ĈARO FABRIKITA EN ŜANHAJO

Alte tenante la grandan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj persistante teni la revolucion kaj stimuli la produkton, la revoluciaj ribeluloj kaj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la riparejo de la Ŝanhaja Aŭtotransporta Kompanio mem projektis kaj sukcesis fabriki en mallonga tempo la unuan peztipan platan dependan ĉaron kun ŝarĝpovo de 150 tunoj en Ĉinio.



Tiu ĉi dependa ĉaro longas je 15 metroj. Al ĝi estis aplikitaj hidraŭlikaj pendiga kaj konduka sistemoj, kaj ĝi karakteriziĝas per malgranda propra pezo, granda ŝarĝpovo kaj facila turnebleco. Kun tia dependa ĉaro oni povas transporti grandan aŭ pezan instalaĵon kun pezo de ĉirkaŭ 150 tunoj sen malmunti ĝin. Tio multe ŝparas laboron, materialon kaj tempon.

NOVA AZOTOSTERKA FABRIKO EN HUNAN-PROVINCO

Lastatempe finkonstruiĝis kaj ekfunkciis por produktado en Hunan-provinco la Joŭhian-a Azotosterka Fabriko. Tiu estas la unua en sia speco kiun oni mem projektis, ekipis kaj instalis en la nomita provinco.

Plejparte el la fabrikoj, kiuj faris ekipaĵojn por tiu ĉi azotosterka fabriko estas malgrandaj fabrikoj kun simpla kaj malbona ekipaĵo, iliaj revoluciaj laboristoj kaj oficistoj, tamen, sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ pri strebo al prosperiĝo kaj sinapogo sur la propraj fortoj, disvolvis la komunisman stilon de interhelpo, venkis la malfacilojn kaj plenumis sian taskon.

Anglaj

Progresemuloj

Kolere Riproĉis

Perfidulon

Kosigin

KOSIGIN, unu el la korifeoj de la reviziisma reganta kliko de Sovetunio alvenis, la 6-an de februaro, al Anglio por kune kun ties registaro plani konspiron de "paca intertrakto" pri la problemo de Vjetnamio kaj klopodi pri la tiel nomata prevento de nuklea disvastigo kaj "malstreĉo" de la situacio en Eŭropo por servi al la agresa politiko de la usona imperiismo.

En la 12-a de februaro, anglaj progresemuloj kolektiĝis antaŭ la tombo de Marks en Londono por protesti kun indigno kontraŭ la vizito de la perfidulo al marksism-leninismo Kosigin, kiu afekte iris tien por oferi girlandon. La protestantoj samtempe entuziasme hurais: "Vivu Maŭ Zedong!"

Ĉirkaŭ du horoj antaŭ la alveno de Kosigin, tiuj angloj jam atendis ekster la tombejo. Ĉe ĝia enirejo, ili tenis alte slogan-tabulojn, sur kiuj skribiĝis: "Kosigin perfidis la Oktobran Revolucion!", "Klasbatalo, sed ne paca kunesto!", "Laboristoj faligos la imperiismon kaj reviziismon!" k. a. Kiam Kosigin, eskortata de anglaj policanoj, atingis la tombejon, la indignantaj manifestaciintoj kriis: "For Kosigin!"

Dum la manifestaciintoj montris sian fortan abomenon kontraŭ la perfidulo al marksism-leninismo, ili esprimis al Prezidanto Maŭ, granda gvidanto de la popoloj de Ĉinio kaj la tuta mondo, sian senliman amon, ili svingis la ruĝan revolucionan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ*, ripetade kriis: "Maŭ Zedong! Maŭ Zedong! Maŭ Zedong!", "Vivu Maŭ Zedong!" Kelkaj portis cetere sur la brusto oreruĝan insignon de Prezidanto Maŭ glimbrilantan sub la suno.

La 12-an de februaro, 1967, anglaj progresemuloj protestas kun indigno kontraŭ la hipokrita prezento de girlando fare de Kosigin, perfidulo al marksism-leninismo kaj unu el la ĉefuloj de la sovetia reviziisma gvidanta kliko, antaŭ la tombo de Marks, en Londono. La anglaj progresemuloj arde kriis: "Vivu Maŭ Zedong!" Sur iliaj alte tenataj slogan-tabuloj surskribiĝis interalie "Kaŭcki-Trocki-Kosigin Ne! Lenin-Stalin-Maŭ Jes!"



Konfuziteco de Usonaj Soldatoj

Dum batalo en Bin Gia, kiam trupo de Liberiga Armeo de Suda Vjetnamio rekte puŝis sin en la komandejon de pupa trupo, iu usona "konsilisto" tiel terurigis, ke li per unu mano forĵetis sian pistolon kaj per la alia sian mitraleton, kiujn li uzis por rezisti, kaj tremegis puŝante sian kapon en teran amason. Kiam la batalantoj de la Liberiga Armeo alkuris kaj ordonis lin kapitulaci, li treme surgenuiĝis kun levitaj manoj, petegante indulgon por sia vivo. Ĉar en ĝangalo estis malfacile eskorti kaptitojn, oni devis ligi ilin. Dume la batalantoj de la Liberiga Armeo ne havis taŭgan ligilon. Tiam la pale terurita usona


"konsilisto" urĝe montris sian poŝon, por ke oni trovu en ĝi nilonan ŝnuron fabrikitan en Usono, tiel ke iu batalanto de la Liberiga Armeo ne povis ne moke laŭdi la "iniciatemon" de la usonaj soldatoj.

La "specialaj trupoj" de la Usona-pupa kliko estas organizitaj kun granda elspezo de la usona imperiismo. Por kuraĝigi ilin la lasta fanfaronis per sia tuta propaganda maŝinaro ke ili estas "specialistoj de ĝangala milito". Samtempe, la usonaj imperiistoj ankaŭ uzis diversajn kruelajn metodojn por devigi ilin riski siajn vivojn por la usona imperiismo. Tamen, ĉio

ĉi ne multe helpis por eviti disfalon de la "specialaj trupoj". Foje du plotonoj de tiuj "specialaj trupoj" estis senditaj al monto 9 km. for de An Khe por traserĉi ĝin. Kiam la du plotonoj venis al la piedo de la monto, ili ne kuraĝis suriri la monton kovritan de mistera, densa arbaro. Ili do sencele pafadis ĉe la montpiedo por kuraĝigi sin. Kiam ili forkonsumis sufiĉe longan tempon, ili raportis al la komandejo: "La monto jam estas traserĉita, neniuj vjetnama komunisto estas trovita." Tuj post tio ili urĝeme reiris al la fortikigita punkto, kiun ili okupis.

Usona agresanto tutkorpe vundita de sudvjetnamaj popolanoj

La 13-an de februaro, heroo liberiga trupo de suda Vjetnamio bombardis la komandejon de la usona armeo agresanta Vjetnamion. La obusoj eksplodis malpli ol 70 metrojn proksime de tiu komandejo. Jen la ĥaoso ĉe la eksplodejo.



Kanto pri Oŭjang Haj

9-a Ĉapitro: Sturmo kontraŭ Flamanta Fajrego

(daŭrigo)

ALTA NORMO

EN la rota oficejo Hjue Hinven estis skribanta resumon pri la rekonstruado de la ŝoseo. Li kliniĝis super la tablo kaj serioze pripensis. Post kvin tagoj da intensa laboro, sur lia vizaĝo ankoraŭ vidiĝis neelĉerpebla energio, kvankam la ŝultrumoj de lia nova armeana uniformo frottruiĝis. Post kiam Guan Jingkuj iris al la trejna grupo, li prenis sur siajn ŝultrojn la ŝoserekonstruan taskon. Estis vere malfacile por bone gvidi roton. Tiom multe da aferoj li devis zorgi kaj fari! Ĉu dum la tago, ĉu dum la nokto, liaj ŝultroj neniam liberiĝis de ŝarĝo. Eĉ se li demetis vekton kun korboj, la ŝarĝo de respondeco tamen ĉiam pezis sur lia koro.

Hodiaŭ la rekonstruado de la ŝoseo estis fundamente plenumita, kaj la batalionestroj eĉ iom laŭdis ilin. Tamen, ankoraŭ restis multege da laboro, kiun li devis fari. Kiam li finskribis la resumon, li prenis nomliston de sur la tablo. En ĝi estis la nomoj de la kamaradoj, kiujn li intencis honorati per laŭdo antaŭ la tuta roto surbaze de la opinioj unuapaŝaj elmetitaj de la plotonoj. Kvar el la kamaradoj estis de la sepa subplotono, inkluzive Oŭjang Haj. Hjue Hinven pensis kaj pensis rigardante la liston, sed li ne povis decidi por la momento. Ĉe la kunveno de la partifiliaj komitatanoj Guan Jingkuj elmetis malsamajn opiniojn rilate al lia juĝo pri Oŭjang Haj kaj faris kritikon pri iuj el liaj agmanieroj. Ŝajnis, ke iliaj opinioj estas raciaj. Sed, aliflanke li sentis, ke post kiam li kritikis Oŭjang Haj en la vespero de la pasinta dimanĉo, tiu jam multe plibonigis sian konduton. Dum la rekonstruado ĉiuj kamaradoj esprimis opiniojn favore al Oŭjang Haj, do tio montris, ke lia kritiko estis ĝusta kaj efika. Tamen, ĉu estas dece nun lin honorati per laŭdo antaŭ la tuta roto? Ĉu la fiereco kaj memkontento de Oŭjang Haj ne plu aperos, post kiam li estos ricevinta laŭdon?

“Jes, Oŭjang Haj estas bona kamarado, plena de entuziasmo en laboro. Mi ja rekonas tiujn

bonajn kvalitojn. Sed li tro facile fieriĝas. Ne estas utile nun lin laŭdi,” diris Hjue Hinven al si mem. “Mi devas ĉerpi instruon el la lasta okazaĵo, certe estos prave lin trakti pli rigore. Li estas malnova kamarado, kaj ne gravas, se oni ne honoras lin per laŭdo por unu aŭ du fojoj. Krome, la sepa subplotono elmetis kvar kamaradojn por honora mencio. Iom tro granda estas la proporcio . . .” Nun li ekprenis la nomliston, kaj estis preta iri al Ĉen Jonglin, la estro de la tria plotono, por interkonsiliĝi kun li. Ĝuste kiam li ekstaris, tra la pordo eniris batalanto.

“Raporto!” kriis la kuriero de la bataliono. Li enmanigis al li leteron kun peto pri informoj koncerne al iu batalanto, kiu estingis fajregon. Kunsendita estis ankaŭ la duone forbruligita libro *Ruĝa Roko*.

“Direktanto, bonvolu enketi, ĉu tiu fajroestinga batalanto estas de la tria roto. Respondu al la bataliono kiel eble plej rapide.”

“Bone, bonvolu reiri.”

Kiam la kuriero foriris, Hjue Hinven revenis al la tablo, elkovertigis kaj legis la leteron. En ĝi estis skribite, ke je la 15-a laŭ la lunkalendaro iu batalanto de la Liberiga Armeo, kiu sin nomis ‘batalamiko de Lej Feng’, dorsportis maljunulinon for el fajrego en Huanggiavan, kaj ankaŭ helpis la amason estingi la fajregon. La komunumo esperas, ke la trupo povos helpi ilin trovi tiun bonan batalanton. Hjue Hinven ne povis memori, kiu dato estas hodiaŭ laŭ la lunkalendaro, kaj, krome, ĉiuj estis tre okupitaj dum la lastaj tagoj, neniuj foriris, kaj certe neniuj iris, dum ripozo, al loko kia ‘Huanggiavan’. Li tiam ekprenis la libron *Ruĝa Roko*, kiu forte difektiĝis de fajro. Subite li trovis, ke en la libro estas strekitaj multaj ruĝaj linioj, kaj ekkriaj signoj estas aldonitaj post instrudonaj frazoj. Sur la frontpaĝo estis jenaj vortoj: “Mi volas lerni de fratino Giang, kaj se la komunismo postulas, ke mi oferu mian vivon, mi certe povas fari tion — ne paliĝi nek senti korbatojn.” Hjue Hinven pensis, ke tiu batalanto estas vere bona!

Sur la kovrilo de la libro neklare videbliĝis kelkaj ideografiaĵoj skribitaj per plumo. Post granda penado Hjue Hinven rimarkis, ke tiuj estas “Ĝoŭ Huŝan”. Li diris ridante:

“Kie troviĝas homo nomata Ĝoŭ Huŝan en nia roto!” Li metis la leteron kaj la libron en la tirkeston. Lia mieno montris evidente, ke li opinias, ke ne estas necese serĉi tiun “batalamikon de Lej Feng” interne de la tria roto . . .

Ĉe la kunveno de la armeanoj de la tuta roto Hjue Hinven finfaris la resumon pri la rekonstruado de la ŝoseo kaj poste proklamis la nomliston de la laŭdendaj kamaradoj. Post la proklamo, en la kunvenejo, kie antaŭe regis silento, tuj ekleviĝis zumado de opiniinterŝanĝo. Li diris:

“Nun la subplotonoj respektive faru diskutojn. Raportu al ni la opiniojn pri la resumeo kaj pri la kamaradoj laŭdendaj. ”

Tuj post kiam Hjue Hinven revenis al la dormejo, envenis Ĉen Jonglin sekvante lin.

“Vidirektanto,” diris Ĉen Jonglin. “La tuta plotono konsentis, ke Oŭjang Haj devas esti laŭdita, ĉar li laboris eminente dum la rekonstruado. Kial vi preterlasis lin? Se vi tiel agas, estos malfacile por ni gvidi la plotonon.”

“Estro de la tria plotono, mi ja ĵus intencis iri al vi por interkonsiliĝi pri la demando. Mi opinias, ke tia aranĝo utilas al Oŭjang Haj. Vi ankaŭ scias, ke tiu kamarado fariĝas iom fieraj kaj memkontenta lasttempe. Ĉu tio ne malutilos al li, se ni laŭdas lin ĝuste kiam li turniĝis iom plibona? Ni ne laŭdas lin ĝuste por helpi la plotonon bone konduki sian laboron.”

“Ne, mi ne opinias ke Oŭjang Haj estas fieraj. Vidirektanto, mi estas malkaŝemulo kaj diras, kion mi pensas. Laŭ mia opinio, tio estas via antaŭjuĝo! Nur unufoje li ne revenis ĝusttempe, kaj la kaŭzo ankoraŭ ne estas konata. Kial vi nepre volas rilatigi tion kun lia fiereco kaj memkontento? Multaj kamaradoj malsame opinias kun via tia kritiko al Oŭjang Haj, kaj ĉe la kunveno de la partifiliaj komitatanoj ni jam unuecigis la opiniojn. Tamen, vi prenis tian paŝon hodiaŭ. Tio montras, ke la analizo pri vi farita ĉe la kunveno de la partifiliaj komitatanoj estas prava. En rilato al la demando de Oŭjang Haj vi pensas tiamaniere, ke . . . mi ne diros, vi mem bone pripensu.”

“Kion vi volas, ke mi pripensu?” demandis Hjue Hinven.

“Vi devas konsideri, ĉu via kritiko al Oŭjang Haj ne estas tro subjektiva kaj unuflanka. Mi sentas, ke vi iom postigiĝis post la aktualeco en penso.”

“Ĉu estas tiel? Kaj ĉu vi scias la staton de Oŭjang Haj? Mi diru la veron, ke mi ankoraŭ ne parolis ĉe la kunveno de la partifiliaj komitatanoj pri tiuj signoj de distriĝemo kaj malzorgemo en la sepa subplotono post kiam ili ricevis laŭdon. Ĉu ni observas la principon, se ni ne kritikis tian bonan kamaradon kiel li, kiu subite fariĝis fieraj? Kamarado, vi, kiel estro de la tria plotono, ankaŭ devas doni pli grandan prizorgon al Oŭjang Haj!”

Ĉen Jonglin sciis, ke la interparolo ne povas daŭri plu. Ekstarante li diris:

“Mi opinias, ke via juĝo pri Oŭjang Haj estas iom unuflanka. Mi proponas okazigi alian kunvenon de la partifiliaj komitatanoj por studi la demandon.”

“Ĉu ni okazigu ĝin nun?”

“Vi decidu pri la tempo,” Ĉen Jonglin diris sincere. “Vidirektanto, vi venis nur antaŭ nelonge. Estas vere, ke vi ankoraŭ ne bone komprenas Oŭjang Haj. Mi estas kune kun li preskaŭ kvin jarojn. Neniun taskon asignitan al li de la roto aŭ regimento li ne plenumis kun tre elstara sukceso. Li konstante tiel agis, kaj estis ĉiam inter tiuj, kiuj ricevis laŭdon. Eĉ kelkaj el la estroj de la armeo scias, ke en la tria roto estas kamarado nomata Oŭjang Haj, kaj kiam ili venis al la trupoj, ili ĉiam venis viziti lin, zorgante pri la progreso de tiu ĉi bona kamarado. Ĉu la juĝo de tiel multaj homoj estas erara? Se vi ne kredas, vi povas iri kaj aŭskulti kiel diras la amaso. Se vi disigas vin de la gvidantaro kaj de la amaso sen zorgi ambaŭ ilin en la laboro, vi faros grandan eraron!” . . .

Ĉiuj subplotonoj estis varme diskutantaj pri la resumeo kaj la honora nomlisto. Sed kiam Hjue Hinven venis proksimen, la diskuto tuj ekmalvigliĝis. Li komprenis, ke la kamaradoj ion ne volis eldiri antaŭ li, kaj li pensis en si, ke li ja devas fari enketon kaj aŭskulti kion diras la amaso. Hjue Hinven ekiris silente al la sepa subplotono.

La tri kamaradoj de la sepa subplotono, kies nomoj estis honore menciitaj, ĉiuj sentis maltrankviliĝon, kaj evidente iliaj paroloj preskaŭ venis al la fino.

“En neniun rilato mi estas komparebla kun nia subplotonestro. Mi sentas ĝenon en mia koro, se mi kaj ne li estas laŭdata, kaj tia laŭdo ne efikas kiel kuraĝigo al la antaŭirintoj,” diris Gaŭ Jiĝong.

“Koncerne min, mi havas nur unu opinion,” diris Liu Janŝeng. “Mi diru malkaŝeme. Oni ne esprimas laŭdon al tiu, kiu tion meritas. Do mi hontas ricevi la laŭdon al mi!”

Ankaŭ Vej Vujue estis inter la honoraj menciitoj. Li tre embarasiĝis, li ne povis esprimi

kunsenton kun la kamaradoj, kiuj estis en ne tute pravigebla humoro, dum aliflanke li ne tre konsentis la opinion de la anstataŭanta vicdirektanto. Li diris heziteme:

“Ni ne devas agi tiel. Se ni havas ion por plendi, ni devas elmeti la opiniojn en bona maniero. Mi sentas, ke al la kamaradoj laŭdataj, nun la plej grava, plej plej grava afero estas ne fariĝi fieraj, kaj al la kamaradoj ne laŭdataj la plej grava, plej plej grava afero . . .”

Juna Liu perdis sian paciencon kaj diris: “Vic-subplotonestro, ne plej-plej-adu senfine . . . Kio plej urĝas, plej plej urĝas al mi, estas aŭdi, kiel vi fine opinias pri tio.”

Veĵ Vujue diris post pripenso: “Kompreneble nia subplotonestro estas bona, ĉiam li estas tia. Rilate al la demando, ĉu li devas ricevi laŭdon aŭ ne, mi plej plej hezitas. Do, mi simple ne diros mian opinion.”

De malproksime Hjue Hinven vidis, ke Oŭjang Haj silentas kun kapo mallecita. “La aliaj kamaradoj estas vere iom nekontentaj pro tio, ke Oŭjang Haj ne ricevis laŭdon,” li pensis. “Nun mi vidu, kiel li mem sintenas rilate al tio.”

“Lasu tion,” Oŭjang Haj ekstaris kaj diris, “mi tute ne samopinias kiel vi. Antaŭ ĉio nia kunveno ne devas alkroĉiĝi al la demando, kiu devas esti laŭdita aŭ ne. Kiam ni finis la taskon, ni devas resumi la sperton kaj ĉerpi instruon por labori pli bone en la estonto. Ni devas serioze diskuti la resumon faritan de la anstataŭanta vicdirektanto.”

“Mi sentas, ke la resumo estas tre bona kaj kompleta. Kun nenio mi ne samopinias, pri kio do oni diskutu ĝin!” juna Liu diris paŭtante.

“Bone, ni venu al la temo pri laŭdo,” diris Oŭjang Haj rigardante junan Liu. “Ĉu ni laboras por ricevi laŭdon? Ne. Prezidanto Maŭ diris: **‘Niaj trupoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo.’** Ĵus antaŭ la kunveno ni legis tiujn vortojn, kaj nun estas tempo por kreive studi kaj kreive apliki ilin. Koncerne min, mi estis kritikita en la vespero de la pasinta dimanĉo. Se mi estus laŭdita pro mia malgranda progreso dum la rekonstruado de la ŝoseo, kiel la gvidantaro faru sian laboron en la estonteco?”

Juna Liu refute diris, “Oni faru laboron tiamaniere: laŭdi tiun, kiu estas laŭdenda, kaj kritiki tiun, kiu estas kritikenda. Mi estas unu el tiuj, kiuj estis kritikitaj lastan fojon.”

“Kritiko kaj laŭdo ambaŭ celas helpi la kamaradojn progresiĝi,” Oŭjang Haj diris kun pacienco.

“Tiutage la anstataŭanta vicdirektanto kritikis min nur por igi min koni eraron kaj korekti ĝin. Hodiaŭ li ne esprimis al mi laŭdon. Tio montras, ke mi agis ankoraŭ ne sufiĉe bone, kaj ke mi devas fari pluan penadon. Ĉu tio ne estas por mi ankaŭ sprono? Vi estas nova kamarado kaj akiris rimarkindan progreson, vi ja meritas la laŭdon. Mi ricevis de la Partio pli multe da eduko ol vi, tial oni devas elmeti al mi pli severan postulon. Laŭ mia opinio, tio ke la anstataŭanta vicdirektanto ne honoris min per laŭdo ĉifoje, ĝuste montras, ke li fidus kaj stimulas min.”

“Kiel vi scias lian intencon?” diris juna Liu. “Vi ne estas la anstataŭanta vicdirektanto. Mi ne kredas . . .”

Oŭjang Haj serioze diris, “Juna Liu, kiel batalantoj ni devas kompreni la kritikon aŭ laŭdon de la supera instanco el pozitiva flanko sub iu ajn cirkonstanco. Nur tiamaniere ni povas unuigi la paŝojn kaj bone plenumi la laboron. Ekzemple, ĉiuj vidis, ke la anstataŭanta vicdirektanto mem ludis tre elstaran rolon per sia bona ekzemplo dum la vojkonstruado. Gardstarante en nokto mi kelkfoje vidis, ke li ankoraŭ interkonsiliĝis en malfrua horo kun la teknikisto pri la konstrua laboro de la sekvinta tago, sed en la sekvinta tago li denove daŭre laboris kune kun ni. Li estas preskaŭ tridekjara kaj havis malmultajn okazojn partopreni fizikan laboron en la pasinteco, do li estas malpli forta ol ni junuloj. Tamen, li jam rompis kelkajn vektojn pro ŝarĝopleno, kaj tion sciis la tuta roto. Ĉifoje li esprimis nenion laŭdon pri si mem, nek la estroj de la bataliono laŭdis lin. Sed ĉu ni povas el tio konkludi, ke li nebone faris sian laboron? Ne. La gvidantaro ĉiam konsideras la progreson de iu kamarado el ĉiuj flankoj. Laŭ malsamaj postuloj, oni devas preni malsamajn rimedojn . . .”

Ne finaŭskultinte, Hjue Hinven foriris. La parolo de Oŭjang Haj estis tute ekster lia atendo. Interparolinte kun Ĉen Jonglin, Hjue Hinven jam sentis, ke iom neĝuste estas, ke li ne honoris Oŭjang Haj per laŭdo. Sed Oŭjang Haj eĉ povas tiel bone kompreni la intencon de superulo kaj ripete faris klarigojn al la amaso por defendi la gvidanton. “Vere rara estas, ke li havas tiel altnivelan konscion! Jen kamarado eksterordinara . . . Tamen,” li haltis kaj demandis sin mem, “ĉu Oŭjang Haj fine korektis sian eraron aŭ li tute ne eraris, sed nur mia juĝo pri li estas tro unuflanka?” Li revokis al sia memoro la opinion de Oŭjang Haj kaj la kritikon ĉe la kunveno de la partifiliaj komitatanoj. “Ĉu mi estis vere kulpa pri subjektivismo kaj faris eraran juĝon pri li?” Li sentis, ke nun estas tempo por li pripensi tiun kritikon de la

komenco kaj bone konsideri sian originalan opinion

“Vicedirektanto!”

Voko post lia dorso interrompis lian penson. Li trovis Vej Vujue alvenanta al li kaj demandis:

“Vicestro de la sepa subplotono, kio okazis?”

“Vicedirektanto, pri io mi devas raporti al vi. Dum la lastaj tagoj nia subplotonestro laboris kun vundo.”

“Kio? Vundo?”

“Liaj manoj vundiĝis, kaj sur ili troviĝas nur freŝa karno nove kreskinta. Tamen li ne iris al la sanitaristo, sed mem aĉetis botelon da ‘Universala Oleo’ por brulvundo kaj kaŝe kuracis sin.”

Hjue Hinven ekscitiĝis tutkorpe. “Brulvundo?! Diru tuj, kiam tio okazis?” Hjue Hinven kulpigis sin mem. “Ho, kial mi ne informiĝis pri tio?”

“Li tenadis siajn manojn en la gantoj de mateno ĝis vespero, kaj ni mem informiĝis pri tio nur hodiaŭ. Eble, liaj manoj vundiĝis jam ĉe la komenco de la vojkonstruado.”

Hjue Hinven diris al si mem, “Dimanĉo . . . la 15-an laŭ la lunkalendaro . . . jes, la luno montriĝis tute plena en tiu vespero dum nomvokado” Li subite forlasis Vej Vujue kaj kuregis sola al la rota sidejo.

Hjue Hinven revenis al la skribtablo, rapide tiris la tirkeston, elprenis la leteron senditan de la kuriero kaj atenteme legis ĝin per mallaŭta voĉo:

“. . . la 15-an laŭ la lunkalendaro . . . la batalamiko de Lej Feng, Nankoŭ-komunumo, Huanggiavan, bambuoj, elparolo de Hunan-provinco”

La vortoj “Huanggiavan”, “Nankoŭ-komunumo”, “bambuoj” kaj “elparolo de Hunan-provinco” konsternis Hjue Hinven. Li rememoris, ke la deĵoranta plotonestro diris tiutage, ke Oŭjang Haj iris aĉeti nankoŭ-bambuojn. Li riproĉis sin mem:

“Stulta mi ja estas! Kial mi ne zorgeme legis la leteron en la komenco? ‘Al Nankoŭ-komunumo’ — ĉu ne estas klare skribita en ĝi?” Li denove ekprenis la bruligitan libron *Ruĝa Roko*. “Ĝoŭ Huŝan . . . Kiu li estas? Ĉu estas Oŭjang Haj kiu estingis la fajregon tiutage? Se estas tiel, mi ree estis kulpa pri subjektivismo” Li ne plu enpensiĝis kaj decidis venigi Oŭjang Haj kaj demandi lin. “Mi devas fari profundan enketon kaj ne plu povas esti tiel hasta kaj senpripensa.”

La kuriero vokis Oŭjang Haj el lia lito. Renkonte al Oŭjang Haj kiu alkuris butonumante sian uniformon, Hjue Hinven demandis:

“Ĉu vi konas iun nomatan Ĝoŭ Huŝan?”

“Ĝoŭ Huŝan?” Oŭjang Haj diris pripensinte, “pri kiu vi volis demandi? Ĉu pri sekretario Ĝoŭ de nia komunumo?”

“El kiuj ideografiaĵoj konsistas lia nomo?”

“‘Hu’ signifas ‘tigron’ kaj ‘ŝan’ signifas ‘monton’.”

“Nu!” Hjue Hinven konstatis, ke ne estas necese fari pluan demandon. Li svingis sian manon kaj mallaŭte diris:

“Nenio plu. Vi, nun vi iru dormi.”

Oŭjang Haj reiris senkomprene.

Hjue Hinven sentis, kvazaŭ lia kranio krevus. Li rigardis la ege bruldifektitan libron *Ruĝa Roko* kun okuloj fiksitaj. Vespera vento enblovis tra la fenestro, kaj de tempo al tempo foliumis la ruĝan kovrilon tiel ke la tuta libro ŝajnis grandamaso da fajro brulanta antaŭ liaj okuloj, kaj ŝajnis al li, ke lia koro estis en la flamoj. Li diris dolore:

“Estas evidente, ke la kritiko ĉe la kunveno de la partifiliaj komitatanoj, la opinio de rotestro Guan kaj la analizo de Oŭjang Haj estas tute korektaj. Estas mi, kiu . . . eraras. Mi ne volas fari esploron kaj studon, kaj tiu difekto mia kaŭzis al mi grandan perdon. Mi postiĝis post la aktualeco, faris erarojn, miskomprenis bonan kamaradon, kiun ĉiuj laŭdas, kaj miskulpigis vere bonan batalanton”

La kritiko de la partifilia komitato, la parolo de Guan Jingkuj, la admono de Ĉen Jonglin kaj la analizo de Oŭjang Haj ŝajnis arda fajrego estigita de la *Ruĝa Roko*, kaj ĝiaj flamoj fortege brulis en la koro de Hjue Hinven. Ĝi forbruligos la subjektivismon kaj la tromemfidemon en li. Li estis tiel bruldolorigita fojon post fojo, ke li klinis sian kapon iom post iom

Ŝajnis, ke iu voĉo abrupte kriis:

“Hjue Hinven, sturmu kontraŭ la flamanta fajrego, same kiel Oŭjang Haj!”

Penso ankoraŭ zumis en la kapo de Hjue Hinven. Li rememoris, ke antaŭ lia alveno la gvidantaro planis irigi lin al la malnova tria roto por profundigi en praktikon kaj bone lerni. Li ne imagis, ke li faris eraron nelonge post la alveno. Kion fari ekde nun? Levinte sian kapon kaj vidante la portreton de la gvidanto, Hjue Hinven subite ekstaris. Li revokis al sia memoro la intiman instruon de Prezidanto Maŭ:

Komunisto devas esti ĉiam preta reĝustigi sian eraron, ĉar ĉiu eraro ne konformas al la interesoj de la popolo

(daŭrigota)



Ŝtona Pistujo de Ginggang-Montaro

Tiu ĉi krude farita, ŝtona pistujo estis uzata por pisti kuracilojn en hospitalo de la Ruĝa Armeo en la revolucia bazloko Ginggang-montaro antaŭ pli ol tridek jaroj.

Tiam la bataloj estis oftegaj kaj la vivo estis tre malfacila. En sia verko *Batalado ĉe Ginggang-montaro*, Prezidanto Maŭ skribis: "Post ĉiu batalo aperis aro da vunditaj soldatoj. Pro nesufiĉa nutrado, frostiĝo kaj aliaj kialoj multaj oficiroj kaj soldatoj estis malsanaj. La hospitalo estis starigita sur la monto, kaj oni kuracis per ambaŭ okcidenta kaj ĉina tradicia manieroj, sed ne sufiĉis kaj kuracistoj kaj medikamentoj." La hospitalo sur la monto, kiun Prezidanto Maŭ menciis, estis ĝuste de la Ĝenerala Hospitalo de Ruĝa Armeo de Hunan kaj Gianghi. En ĝi mankis eĉ tablojdoj por ordinaraj malsanoj, do estas imagebla la manko de aliaj medikamentoj kaj medicinaj instrumentoj. Sed la grandega malfacileco ne povis subigi la medicinajn laborantojn de la Ruĝa Armeo kun plej persista revolucia volo. Ili surgrimpis montojn por kolekti kuracherbojn. Ĉar estis necese pulvorigi parton de tiuj kuraciloj ili prenis ŝtonon sur Ginggang-monto kaj elfaris tiun ĉi pistujon post peniga ĉizado. Ĝi montras la revolucionan volon de la batalantoj de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo sub la gvido de k-do Maŭ Zedong, kiuj timis nek penojn nek suferojn por forigi ĉiujn malfacilojn.



EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 4 (106) 1967

Ĉefa Enhavo

Servu al la Popolo

Ĝang Side — Granda Komunisma
Batalanto

Memoro pri Kamarado Ĝang Side

Servi al la Popolo Kiel Ĝang Side

Prezidanto Maŭ Akceptis Kamara-
dojn Hysni Kapo, Beqir Balluku
k. a.

Tutmonda Popolo Varme Amas
Prezidanton Maŭ

La Plej Granda Evento en la Homa
Historio

Post Transpreno de Potenco

Ruĝaj Soldatetoj en Longa Marŝo

Ĝang Side, Kiu Tutkore Servis al
la Popolo

"Sagaca Konkero de la Tigro-
monto"

Kun Plena Revolucia Pasio Fremd-
landaj Specialistoj Labore Hardas
Sin en Kamparo

Ruliĝas Antaŭen la Revolucia Flue-
go de Monda Popolo

Anglaj Progresemluloj Kolere Ri-
proĉis Perfidulon Kosigin


Kanto pri Oŭjang Haj

Sur la kovrilo — Maj Hiande faras
movojn de remado por refortigi
sian korpon.

Sur la dorskovrilo — Gestudentoj
faras praktikon en kampo.



Mineja Laborista Propaganda Trupo varme prikantas la putdrilan trupon 32111, kiu heroe protektis gasputon en fajra maro.



Kantodanco "Kaj Esti Kamparanoj kaj Esti Soldatoj", prezentata de Kamparana Amatora Ensemblo en Hebej por la komunumanoj.

